

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 556 (3) MARTO 1952



La blua fajenco de Delft (*vidu paĝon 72*)

45a Jaro

Marto 1952

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 556 (3)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al ESPERANTO Palais Wilson, Genève, Svis. Urgajn informojn sendu rekte al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1952) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.) Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.
Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu du da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Monumentoj, je honoro de Esperanto : <i>H. Jakob</i>	65
La blua fajenco de Delft : <i>Ed. J. Veldhuyzen</i>	71
Vivo en Kanado—Enmigrado : <i>R. Edis Fairbairn</i>	75
Atentu ! Geinstruistoj ! Atentu ! <i>Erich Dahlmann</i>	77
La H-Bombo : <i>Mason Stuttard</i>	78
Pri la komerco en Svedujo : <i>Erik Rydman</i>	83
Pri la Skota lingvo : <i>F-ino J. Baird</i>	85
Novelo : Nokta ekspreso : <i>Ĝtepan Urban</i>	89
Poezio Traduka (Belartaj Konkursoj 1951)	88
La 37-a Universala Kongreso de Esperanto	79
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploroj kaj Dokumentado	66
El la Oficejo	87
Enigma Konkurso N-ro 66	74
Esperantista Vivo	96
Internacia Konkurso 1952	76
Oficiala Informilo	94
Por via Distro	92
Radio kaj Esperanto	93
Tra la Libraro	80
Tra la Mondo Esperantista	67

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 556 (3)

Marto 1952



Monumentoj, je honoro de Esperanto

LA ne-Esperantista publiko nur malofte havas la okazon konstati la ekziston de internacia lingvo Esperanto. Eksteraj signoj de nia ekzisto estas la kursoj, la Esperantaj manifestadoj kaj kunvenoj, publike anoncataj. Grava pro tiu ĉi propaganda efiko estas la ĉiujara kongreso internacia kaj estas nur manko de teknikaj kiel de financaj rimedoj, se ni ne plenvalorigas tiun ĉi unikan okazaĵon, kia estas nia universala kongreso. Ni Esperantistoj estas tro kutimiĝintaj je ĝi kaj nur malmultaj konsciiĝas pri tiu ĉi neforigebla fakto **kongreso unulingveca** sen tradukistoj, sen multekostaj aparatoj kun aŭdiloj por peze transporti vortojn, ne komunikante la vervon kaj vivon de komuna lingvo parolata kaj komprenata de ĉiuj.

Alia ekstera signo de nia ekzisto estas la stratoj, placoj, monumentoj, honore je nia lingvo. Sinsekve en aro da landoj, stratoj kaj placoj ricevis la nomon ĉu de la kreinto de la lingvo, ĉu de Esperanto. La lasta tiaspeca estis en Munkeno, kie bone lokita placo ricevis la nomon *Esperanto-Platz*. La efektivigon de tia ekstera signo de la ekzisto de Esperanto dependas grandparte de ni mem kaj de la instancoj urbaj aŭ ĝenerale registaraj. Ĝi estas iafoje afero de

politika diskutado laŭ la cirkonstancoj. Oni ne povas ne sufiĉe atentigi je tiu ĉi ebleco, argumentante lerte, konvinki aŭtoritaton precipe de lokoj turisme frekventataj, ke ĝi favorigu la nomdonon de Esperanto al strato aŭ placo. Alia okazo prezentiĝas ĉe domoj kie loĝis Doktoro Zamenhof kaj kie li pasigis certan tempon.

La lasta milito kun siaj antaŭsignoj en aro da landoj, antisemitismo, kontraŭfremda tendenco, nacia ekscitiĝo, k.t.p., malfavoris la ekziston de tiaj stratnomoj. Multaj malaperis, en Germanujo, en Polujo kaj alilande. Sed la fervoro Esperantista ne konas baron. Novaj ekaperas kaj pri unu tia ekstera signo temas tiu ĉi teksto.

Laŭ iniciato de sâמידeano Hans Steiner formiĝis komitato por starigi monumenton honore je D-ro Zamenhof en urbeto Wörgl, Tirolo, fervoja nodo Kufstein-Innsbruck. La inaŭguro okazos la 27-an de Julio sub protekto de lokaj kaj regnaj aŭtoritatoj (pli detalaj informoj sekvos). Gratulon kaj dankon al la iniciatinto kaj kunhelpantoj.

H.J.

Noto : La loko Wörgl fariĝis ĝenerale konata dum la unua epoko 1920-1924, pro la interesa provo redukti la amplekson de cirkulanta mono.

Centro de Esploroj kaj Dokumentado de U.E.A.

Esploroj de C.E.D. pri la Socia Konsisto de la Esperanto-Movado

La C.E.D. entreprenis, inter la aliaj laboroj, ankaŭ grandan enketon por esplori la socian konsiston de la nuntempa Esperanto-Movado. Tiun gravan laboron la Centro realigas pere de sia kunlaboranto Sinjoro C. J. Keur en Hago, Nederlando.

Kvankam mem sociologo, S-ro Keur tamen, antaŭ ol dissendi la demandaron al la landaj asocioj, interkonsiliĝis pri la metodo de esplorado kaj pri la enhavo de la demandaro kun D-ro F. van Heek, konata sociologo kaj profesoro pri sociologio en la universitato de Leiden.

Estas superflue akcentadi la gravecon de tiu studo. Kiam la tuta laboro estos finita, ĝi donos tre klaran bildon pri la sociaj medioj, kiuj estas aparte interesitaj pri la Internacia Lingvo. Tio siavice estos larĝe utiligebla kaj por dokumenti nian starpunkton ĉe UNESKO kaj por nia plua aktiveco sur la kampo de disvastigo de la lingvo. Tial kaj la landaj asocioj kaj la grupoj kaj la unuopaj Esperantistoj estas varme petataj doni ĉian eblan helpon al S-ro Keur, por ke li povu kontentige fini tiun laboron.

Novaj donacoj al la C.E.D.

	£	ŝ.	p.
Donacite ĝis 25.XI.1951 ..	126	13	0
S-ro E. Haubrick, Rotterdam	2	10	0
Friza Esp. Rondo, Leeuwarden	5	0	0
Kolektite en Leeuwarden ..	5	16	0
D-ro R. H. Crowley, Tewin..	10	0	0
F-ino C. Waller, Bournemouth	10	0	0

Sume, la 1-an de Feb. .. £150 9 0

Koran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn oni sendu aŭ al U.E.A., aŭ al U.E.F., Parizo, menciante por C.E.D.

Dokumentoj de C.E.D. en Esperanto

La C.E.D. jam sendas al diversaj gravaj neesperantistaj institucioj dokumentojn pri nia lingvo kaj movado. La dokumentoj, kompreneble, estas farataj en la oficialaj lingvoj de tiuj organizaĵoj, do plej ofte en la angla kaj franca. De pluraj flankoj venis demandoj, ĉu la samaj dokumentoj ne povus esti eldonataj ankaŭ en Esperanto kaj tiamaniere utiligataj pli vaste de niaj landaj organizaĵoj por informado de apartaj landaj medioj. La C.E.D. estas preta eldoni tiujn dokumentojn ankaŭ en Esperanto, se troviĝos minimume 30 interesigantoj, **kiuj estas pretaj aboni ilin je la kosto de 1 angla pundo jare.** Tial ĉiuj personoj aŭ organizaĵoj, kiuj dezirus aboni la Esperantan eldonon de la dokumentoj, bonvolu pri tio informi la Centron je la adreso: D-ro Ivo Lapenna, 300 West End Lane, London N.W.6.

Ni atentigas, ke la dokumentoj aperas proksimume du fojojn en la monato.

OSLO

Post la fino de Marto.
la kotizo plialtiĝos.

Aliĝu nun !



Tra la Mondo Esperantista



Ĉeĥoslovakujo

La Ĉeĥoslovaka gazeto 'Esperantista' (organo de la Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko) en la numero de Decembro 1951 informas :

“Tiu ĉi numero de nia revuo estas la lasta. La inform-ministerio reorganizis planon de eldonado de gazetoj. Pluraj estis ĉesigitaj kaj anstataŭitaj per aliaj, por ke ankaŭ en eldonadon de monataj gazetoj envenu nova plano. Inter la ĉesigitaj estas ankaŭ nia gazeto.

“Ni uzas la okazon por danki al niaj legantoj enlandaj kaj eksterlandaj pro atenta sakvado de nia revuo, al niaj kunlaborantoj pro ilia kontribuado kaj al niaj membroj pro ilia fideleco kaj aktiveco.

“Nia Asocio ne ĉesos sian ekzistadon. Ni esperas, ke ni povos kontakti kun nia membraro per ciklostilitaj cirkuleroj. Krome ni klopodos ricevi permeson, ke eksterlandaj gazetoj esperantistaj povu veni en nian landon en pli granda nombro. Ankaŭ pri ebleco ricevi el fremdlando esperantajn librojn ni denove klopodos.

“Ni traktas pri eniĝo de nia Asocio en iun amasorganizon. Granda parto de niaj lokaj grupoj eniĝis jam en kulturklubojn de Revolucia Sindikata Movado ROH.

“Estas intenco en Inform-ministerio krei por similaj societoj kiel nia apartan centron. Pri tio ni informos esperantistojn taŭgatempe. Fine estos informita nia

regula jarkongreso, kiun ni esperas kunvenigi dum marto en Praha.”

Ni komunikas tion sen komentario. Ni adiaŭas niajn kunfratojn en la gazetaro kun espero, ke iam *Esperantista* kaj *Esperantisto Slovaka* povos reaperi.

Danlando

Internaciaj FERIAJ Kursoj okazos en Helsingør kiel kutime je 25 julio–1 aŭgusto kaj je 19–26 oktobro en Vejle. Informoj de S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, AABYHØJ, Danlando.

Francujo

Nova ĵurnala kurso. La Nordfranca tagĵurnalo *Nord-Eclair* publikigas ĉiuĵaŭde Esperanto-kurson kiun redaktas Lucien Giloteaux.

Esperanta Kulturdomo (vidu la bildon sur paĝo 68). Laŭ iniciato de la Esperantista instruista fako estas ĵus aĉetita bela kastelo por Esperantaj somerkursoj kaj internaciaj renkontoj. Plano por 1952 :

1-a periodo : por ekzercado pri la arto deklami, rakonti, aktori al Esperanta rondo ;

2-a periodo : kutima somerlernejo de G.E.E., precipe sed ne ekskluzive por instruistoj kaj profesoroj, kun komenca, daŭriga kaj perfektiga kursoj ;

3-a periodo : similaj kursoj por ĉia profesulo ;

4-a periodo : seminario.

Ĉio kun distroj kaj ekskursoj



*"Le chateau de Grésillon," apud Baugé, Francujo,
la nova Esperanta Kulturdomo. (Vidu paĝon 67).*

okazos inter la 1-a de Julio kaj la 30-a de Septembro. Precizajn datojn oni baldaŭ anoncos. Por informoj oni sin turnu, kun respondkupono, al F-ino Jeanne Dedieu, Komitatano de U.E.A., 3 rue Arzac, TOULOUSE, Francujo.

Vojaĝo al Hispanujo okazos 6–19 aprilo. Informoj ĉe S-ro P. Petit, 26 rue Rochebrune, ROSNY-SOUS-BOIS (Seine) Francujo.

Hispanujo

Radio kaj Esperanto. Ni sukcesis enmeti informon pri la novaj radio-programoj je la presprovaĵoj de la Februara numero. Jen iom pli da informo.

Oni inaŭguris la programojn en Radio S.E.U., Madrido, je la 9-a de Januaro. *Anteno Esperantista*, kiel oni nomis ĝin, estas programo dulingva, en Esperanta kaj Hispana lingvoj, por ke la ne-Esperantistoj Hispanaj povu kompreni la sciigojn kaj informojn. Redaktas ĝin samideano Dario Rodriguez López de Silva, al kies

adreso (str. Galileo 51, 5a, MADRID, Hispanujo) oni povas sendi ĉiujn informojn kaj sciigojn por enmeti en la programon, sed dankleterojn aŭ poŝtkartojn, gratulojn, k.c. oni sendu al la direktoro de la radiostacio. (Vidu la Radiopaĝon). Oni petas pri helpo rilate al Esperantaĵoj por la programo—se oni povas donace sendi Esperantajn muzikdiskojn, broŝurojn, revuojn, prospektojn, k.t.p.

Prelego, Radio, Kurso. Raportante al ni pri prelego farita de S-ro Delfi Dalmau (U.E.A. Peranto por Hispanujo), nia Delegito en Tarragona, S-ro J. Güell Socias, informas ankaŭ ke li ricevis permeson de la koncernaj instancoj por diskonigi Esperanton per la radiostacio Radio Tarragona Hispanlingve dum dek minutoj ĉiusemajne, kredeble komenciĝante en Februaro. Tie ankaŭ komenciĝos kurso en Marto en salono de ŝtata kooperativo.

Indonezio

Revekiĝo. El letero datita 26

Januaro de S-ino Datre Toemenggoeng (Pegangsaan Temur 25, DJAKARTA, Indonezio) ni ekstraktas la jenon :

“Dum unu monato mi nun laboras por konstrui Esperanto-Movadon en Indonezio. Antaŭ la milito ekzistis forta Esperanto-movado ĉi tie ; poste multaj Esperantistoj malaperis. Mi komencis propagandi en radio kaj verkis gazetartikolojn pri Esperanto. Feliĉe mia laboro estas benata de Dio, kiel mi vidas per la sukcesoj. Mi ricevas multajn leterojn el tuta Indonezio, inter ili ankaŭ de malnovaj Esperantistoj. La intereso por la afero estas tre granda eĉ flanke de la Indonezia Registaro. Ni starigis en Djakarta grupon. En urbo Medan jam ekzistas grupo, gvidata de samideano Hasan Basri.

“Mi promesis en la kongreso de Munkeno ke mi laboros fervore, spite de mia multflanka alia laboro. Mi revenis hejmen en decembro de Eŭropo, la kultura kontinento kiu multe impresis min. Mi kunprenis multajn belajn impresojn kaj trovis aron da bonaj amikoj dank’ al Esperanto. Ĉiutage alvenas deko ĝis dudeko da leteroj el eŭropaj landoj. Mi estas tre ĝoja kaj kontenta pri tio, ke mia mondo nun estas pli granda kaj pli vasta. Fakte la Esperanto-movado estas mirinda.”

Maroko

Radio. Por la Franclingve dissendita Esperanto-kurso de Radio Maroc (vidu la radiopaĝon), la Maroka Esperanto-Asocio provizos du vojaĝ-premiojn (al Nederlando kaj al Italujo) kaj ĝi petas de tieaj samideanoj helpon rilate al gastigado. Oni skribu al la Prezidanto de M.E.A., S-ro C. Thollet, Avenue Clémenceau, PORT LYAUTEY, Maroko.

Nederlando

Komercaj uzoj de Esperanto. La *Rotterdamse Bank* kaj *Middenstands-bank* en Amsterdam havas Esperantistojn inter la oficistaroj. Ambaŭ pendigis en siaj departementoj por eksterlandanoj ŝildojn ‘Esperanto Parolata’. *Schiphol Flughaveno* decidis simile agi, sed ĉar nur unu oficisto bone parolas Esperanton, S-ro Hans Bakker nun aranĝas kurson tie. *Wagonslits/Cook* mencias sub la menukarto en la restoracio-vagonoj ‘Tarifo en Esperanto havebla’ : tiu dulingva karto (Esperanta kaj Nederlanda) estas bone farita.

En la Kongreshalo (Indonesia Instituto) Amsterdam oni dufoje permesis Esperantan afiŝon dum gravaj internaciaj kongresoj, kaj promesis permeson je estontaj okazoj.

Nov-Zelando

La 17-a Esperanto-Kongreso okazis en Tauranga, marborda urbo, je 29 Decembro 1951–2 Januaro 1952. La Urbestro bonvenigis la kongreson kaj pli ol 50 membroj aliĝis. Pro neĉeesto de la Prezidanto, la dumviva Honora Prezidanto, S-ro Bertram Potts prezidis. Okazis aferkunsidoj de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, fakkunsido pri Blindulaj Aferoj, kaj fakkunsido de U.E.A. membroj, al kiu nia Ĉefdelegito, S-ro Brendon Clark, raportis, kaj ankaŭ lingva kunsido. La Kongreso decidis subteni laŭeble la laboron de la Propaganda Fakto de U.E.A. Ekskursojn oni aranĝis al apuda marbordo kaj al malnova misiejo fondita en 1838, du jarojn antaŭ ol Nov-Zelando fariĝis Brita Teritorio.

La 18-a Kongreso okazos en Auckland dum Decembro 1952.

Svedlando

Vigla propagando en Göteborg. Dum

la lastaj kvin monatoj, nia Ĉefdelegito Sveda S-ro Einar Adamson parolis pri Esperanto ĉe diversaj ne-Esperantistaj organizaĵoj. Rezultiĝis bonaj kursoj.

La Esperantoklubo de Göteborg aranĝis en januaro du bonvizititajn kunsidojn, ĉe kiuj parolis angla samideano John Milton kaj la konsulo de Kubo en Göteborg, s-ro Eduardo Morilla, lerta Esperantisto el Habana. Bedaŭrinde li baldaŭ forlasos Göteborg por reprezenti sian landon ĉe la Okcidentgermana registaro en Bonn.

Ŝtatsubvenciata kurso. Antaŭ tri jaroj okazis en Viskadalen, Svedlando, internacia kurso pri la temo "Sveda socia strukturo". Tiu kurso estis tiel sukcesa, ke la Sveda Esperanto-Instituto decidis aranĝi novan internacian kurson pri la temo "La nuntempa Svedlando".

Pro la kontentiga raporto pri la antaŭa kurso la sveda registaro decidis asigni 4.000 kronojn por la aranĝo de tiu ĉi nova kurso, kiu okazos en la altlernejo Bohusgården apud Gotenburgo, dum la tempo 27 julio–2 aŭg. La Instituto fiksas tiun daton por ebligi al la partoprenantoj de la Universala Kongreso en Oslo survoje halti en Bohusgården por ĉeesti tiun kurson.

La prezo de la kurso estos 75 sv. kr., por kiu sumo la kursanoj ricevos krom la instruado ankaŭ loĝon, manĝon kaj ekskurson al Gotenburgo kun vizito ĉe iu sveda grandfabriko. La kurson povas partopreni maksimume 25 personoj. Al kelkaj kursanoj la Instituto povas konsenti malpli-grandigon de la kurskotizo, post prezento de taŭgaj rekomendoj kaj atestoj. Detala programo aperos en venonta numero de nia gazeto. Informoj ĉe Sveda E.-Federacio, Tegelbacken, Stockholm.

Turkujo

Lastatempe okazis pli vigla propaganda agado en Turkujo, danke al fervora laboro de S-roj Hasan Kocaman, Ferruh Canatay kaj aliaj. Tiu agado estas helpita per la eldono de la unua Esperanto-lernolibro en la Turka lingvo, verkita de S-ro M. Z. Yumuk kaj eldonita de lokaj samideanoj kun helpo de UEA.

Internacia skirenkontiĝo

Okazis en Titisee, Schwarzwald, Germanujo, de la 27-a de Decembro ĝis la 1-a de Januaro 1952 internacia skirenkontiĝo. Partoprenis dudeko de junuloj el Danlando, Francujo, Germanujo kaj Svislando. Okazis ekskursoj en la idilian ĉirkaŭaĵon kaj skiado sur la monto Herzogenhorn.

Menciinda estas la kultura programo. Dum du vesperoj diverslandaj dokumentfilmoj estis montrataj. Plimulto de la partoprenantoj estis studentoj aŭ altlernejoj, kaj pro tio dana delegacio aranĝis rondtablan konferencon pri studmanieroj en Danlando. Krome oni diskutis pri jenaj temoj: "La filmo en la vivo de junaj homoj" kaj "Ĉu kaj kiel ni povas atingi unuigitan Eŭropon?" La Dana Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj sendis ekzempleron de la libro *Faktoj pri Danlando* al ĉiu partoprenanto.

XXXVa Internacia Eŭkaristia Kongreso

Tiu kongreso okazos en Barcelona, Hispanujo, de la 27-a de Majo ĝis la 1-a de Junio 1952. La Esperantistoj, kiuj deziras partopreni kaj ĉeesti la E.E.M. (Eŭkaristiaj Esperanto-Mondkunvenoj) sin anoncu al F-ino Maria Jung, Avda José Antonio 470, Barcelona, Hispanujo.

daŭrigo sur p. 82

Ed. J. Veldhuyzen

La blua fajenco de Delft

EN la dua duono de la 16-a jarcento oni jam fabrikis en Nederlando fajencon kun plurkoloraj dekoracioj sur blanka fono, laŭ tekniko, kiun la Nederlandanoj estis lernintaj de siaj italaj kolegoj. La situacio tre ŝanĝiĝis, kiam la Nederlandanoj post 1600 kunportis konsiderindajn kvantojn da porcelano el la Malproksima Oriento. Tiu ĉi porcelano kun bluaj dekoroj sur blanka fono tre plaĉis kaj la nederlandaj potfaristoj jam baldaŭ klopodis fari ion similan. Precipe en Delft kaj Rotterdam oni eksperimentis kun sukceso, post kio la nombro da metiejoj en tiuj ĉi urboj tre kreskis. En Rotterdam establiĝis 12, en Delft eĉ 30 fabriketoj. En 1653 David Anthoniszoon van der Pyet fondis “*De Porceleyne Fles*” (la porcelana botelo). Tiu ĉi entrepreno dum multaj jaroj floris kaj apartenis al la unuarangaj metiejoj. En la daŭro de la jaroj ĝi transiris en diversajn manojn. En la 18-a jarcento la delfta fajenc-industrio devis barakti kontraŭ malfacilaĵoj, inter kiuj la plej grava ekestis, kiam la Anglo Wedgwood eltrovis la blankan, malmolan fajencon, la t.n. “anglan fajencon”, kiu multilate superis la delftan. Kvankam kelkaj provis imiti la novan eltrovon, oni nur parte sukcesis. Aliaj klopodis rezisti al la konkurenco, fabrikante amasproduktojn, sed tiu produktado rezultigis neeviteble perdon je kvalito, ne nur teknika, sed ankaŭ arta. La malnova delfta industrio tre malprosperis. En la komenco de la 19-a jarcento ekzistis nur mizera restaĵo de la iam tiel floranta metio. La periodo de la franca okupado fine donis la mortigan

baton: kiam ĝi finiĝis restis nur kvaro da metiejoj, el kiuj fine nur “*De Porceleyne Fles*” sukcesis daŭrigi sian ekzistadon. Oni devis ĉesigi la fabrikadon de la malnova *delft* kaj komencis amasproduktadon de malmultekosta, surprisita fajenco por eksporto, uzante la saman materialon kiel por la angla fajenco. Ornama aŭ arta fajenco absolute ne plu estis fabrikata.

En 1876 delfta inĝeniero, Joost Thooft, aĉetis la fabrikon, intencante restarigi la malnovan tradicion, la faradon de blua *delft*. Li komprenis, ke la antaŭa, rompiĝema speco de fajenco ne plu povos havi sukceson. Li serĉis kaj trovis la solvon en kunmetaĵo simila al la blanka, pli densa angla fajenco, kiun li sukcesis



Laboranto formanta vazon

perfektiĝi kaj adapti al la postuloj de bela kaj arta produkto. Kun Labouchère li sukcesis, en relative mallonga tempo, fari produkton, kiu akiris en la mondo same bonan renomon kiel antaŭe la malnova *delft* kaj konservis ĝin ĝis hodiaŭ.

La nova bluaĵo distingiĝas de la malnova en multaj rilatoj: ĝi fariĝis tute nova produkto, ne nur el teknika vidpunkto, sed ankaŭ laŭ aspekto. Kelkaj produktoj pensigas pri malnovaj formoj kaj dekoracioj, sed same ofte oni vidas novajn formojn kaj originalajn ornamojn. Ĝi volas havi propran karakteron kaj ne esti konsiderata kiel imitaĵo de la malnova.

Krom la blua *delft* la fabriko faras ankoraŭ kelkajn aliajn specojn de

ornamfajenco, pri kiuj ni ne donas detalojn.

En du sekcioj de la fabriko estas farataj arkitektura kaj teknika fajencoj. Estas evidente, ke ne eblas doni tie ĉi superrigardon pri tiu ĉi diverseco de produktoj. Ni donos nur mallongan skizon de la farado de tio, kio plej multe imponas la homojn: la blua *delft*.

Neniu el la diversaj materialoj, blanka argilo, kaolino, kvarco, feldspato, kreto k.c. troviĝas en la nederlanda grundo. Tuta grupo da landoj liveras ilin: Anglujo, Francujo, Ĉeĥoslovakujo, Svedujo, Germanujo, k.t.p.

La materialoj estas laŭ specialaj receptoj miksataj kaj kun akvo



*Kelkaj fajencaĵoj fabrikataj de "De Porceleyne Fles"
Vidu ankaŭ nian kovrilpaĝan bildon*

muelataj en t.n. kuglo-mueliloj. La fluida pasto preterpasas magneton, por ke eventualaj fereroj eliĝu. Parto de la pasto estas senigata je granda kvanto da akvo. Ĝi forlasas la maŝinon en knedeblo stato kaj estas uzata sur disko por fari el ĝi ĉiajn objektojn, kies formo estas ronda. Alia parto de la pasto estas muldata en gipsmodelojn. La malsekaj pecoj estas sekigataj kaj poste unuafoje bakataj en forno je temperaturo de 1200° C. La unufoje bakita, blanka poroza materialo portas en la tuta mondo—sufiĉe strange—la nomon “biskvito”. Sur tiu ĉi biskvito nun estas pentrata la ornamo per tre maldika miksaĵo de farboj, ĉefe konsistanta el kobaltoksido. La pentrado okazas ekskluzive per la mano. La pentrita biskvito post tio estas trempata en maldensa flua glazuro, kiu kovras la objekton per travidebla, vitrosimila haŭto. Post dua bakiĝo la produkto estas preta.

Ankoraŭ mallonga klarigo pri la diferenco inter porcelano kaj fajenco, pri kiuj nocioj ofte regas konfuzo. Ambaŭ povas esti farataj el la samaj materialoj, sed en malsamaj

proporcioj kaj por la porcelano kun baktemperaturo konsiderinde pli alta (super 1300° C.). En la praktiko oni tamen uzas aliajn argilspecojn por porcelano ol por fajenco. La ecoj de porcelano kaj fajenco tre diferencas: rompita fajenco povas havi randon blankan aŭ koloran, porcelano ĉiam estas blanka. Fajenco estas tereca kaj ĉiam pli malpli poroza sur la rando de rompopeco. Ofte ĝi gluiĝas al la lango. Porcelano estas sur tiu rando ĉiam densa kaj vitrece brilanta, dum ne aŭ apenaŭ estas videbla limo inter glazuro kaj porcelano; ĉe fajenco ĉiam ekzistas akra limo. Se maldika, porcelano estas diafana.

Estas tre strange, ke la fama fabriko en Delft nomiĝas “*De Porceleyne Fles*”—la porcelana botelo—kvankam ĝi neniam fabrikis porcelanon! Ĉiuj ĝiaj produktoj estas fajencaĵoj.

Ni dankas al “De Porceleyne Fles” pro la prunto de kliŝo kaj fotoj.



Nova ilustrita libro por gejunuloj

LA HUNDO KRUSO

R. M. Ballantyne (Tradukis J. M. Inman)

Aventuroj de junaj ĉasistoj inter
Indianoj en Ameriko antaŭ cent jaroj
150 paĝoj, 3 ŝil., aŭfranko 3p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED

Mendu ĉe

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Enigma Konkurso N-ro 66

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 64.


N-ro 141.

9...5...6...9...4...14.21...2...48.42
3.234.235.4.4.256.2.2.5.2.1.32.23.2.3
3..47...5...8..16...3...2.2.72.56.5.4
1.83521.3.216.125.1.4.3.8.9.10.98.6.5
2...6...6.484...6.6.5.6.8.6.69.216.16

N-ro 142. Sen povo kolero estas ridinda afero. Ŝlosilvortoj : dekstrulo - elemento - sinoptika - lipharoj - dekoracio - intervalo - sinofero - pelikano - sinodo - vanelnesto - malelasta - panoramo - miogalo - aleneto - oksido - aŭtoro - senatenta - prosperi - darto - peristilo - laŭdano - miligramo - kolonio - transdoni - elatero - praavino - meblofaristo - maleleganta - portero - memorando.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 62-a konkurso : S-ro T. Raimar (Norv) 183, S-ino N. Koudys-Modoo (Ned) 174, S-ro Fr. Couwenberg (Belg) 174p.

Enigmo N-ro 146. Anagram-krucvort-enigmo.



Plenigu la figuron per anagramoj de la vortoj, kiuj respondas al la ĉi-subaj klarigoj.

Horizontale : 1. ŝtofo el delikata lano + multekoste ; 3. kurblinio ; 4. danci ; 5. ĝi flugas ; 6. daŭre resti ; 7. tia estas angla rokaro ; 8. necerteco ; 10. parto de teatra verko + molusko.

Vertikale : 1. militista ĉapo + senferdeka ŝipeto ; 3. glazurbriligi ; 4. diareo ; 5. tago ; 6. nereala ; 7. modera ; 8. havi ideon pri io ; 10. furioze ekscitite + korpoparto.

Enigmo N-ro 147. Ĉevalira enigmo. Formu el la literoj de ĉi tiu figuro aforismon de P. Rosegger. La dika litero **L** estas la komenclitero.

			O	P			
			O	O	I	N	
	J	K	O	C	A	S	
	P	I	T	J	T	T	
S	O	I	I	P	A	R	M
O	L	A	N	R	A	A	R
M	E	L	A	L	A	O	P
L	M	A	L	R	M	E	A
D	A	A	O	Ŭ	T	O	N
O	L	A	P	A	E	S	S

Preseraroj en Konkurso 65. En enigmo 145 bedaŭrinde mankas litergrupo OSK : krome (16) kolorkvietigilo devus esti dolorkvietigilo.

R. Edis Fairbairn :

Vivo en Kanado *Enmigrado*

MI rajtas iom skribi pri ĉi tiu temo ĉar mi mem, kun edzino, formigris de Britujo en 1914 kaj eniris Kanadon. Post unu monato en Halifax, Nova Scotia, ni laŭ eklezia peto plu vojaĝis en la Bermudajn Insulojn, kie mi deĵoris kiel pastro por maristoj, soldatoj kaj dokistoj dum la unuaj tri jaroj de tiu milito. La vivo en Bermudo estas aparte interesa, sed mi mencias tion nun nur pro jena kaŭzo: eŭropanoj novevenintaj Bermudon ne plendas pri la malsekvarmo dum la unuaj someroj, kaj simile enmigrintoj Kanadon ne ĝeniĝas per la malvarmo de la unuaj vintroj. Onidire la kaŭzo estas la sama: post kelktempa enloĝado "la sango maldensiĝas". Klarigu tion, kiu povas; mi ne kapablas.

Ne surprizas novulojn trovi, ke kanadanoj estas preskaŭ tutsame homaj, kiel loĝantoj en aliaj landoj, havante samnombrajn membrojn, samajn sentojn, kapablojn, virtojn kaj pekojn. Iom surprizas anglojn trovi, ke ĉi tie la angla lingvo estas parolata iom amerikane. Ankaŭ certe surprizos ĉi tiujn, konstatu, ke publikaj personoj, kiel policistoj, fervojistoj, poŝtistoj k.s. toleras ilin kun iom da peno! Sed se oni poste koniĝas kaj amikiĝas kun tiuj samaj personoj, klare montriĝas, ke ili estas sufiĉe komplezemaj homoj. Oni konstato, ke la kaŭzo de tiu iom neafabla sinteno fontas en la kutimo de iuj angloj laŭte proklami, ĉu kun, ĉu sen pravigo, "Ho oni faras tion multe pli bone ĉeĥe en Anglujo!" Prudentas do sagace sin deteni de kritiko pri kanadaj aferoj ĝis ĉiuj

estos forgesintaj ke oni ne ĉiam loĝis en Kanado. Eĉ post ĉirkaŭ kvardek jaroj mi iom zorgas pri tio!

Kiel Delegito de U.E.A. en Muskoka, Ontario, mi ricevis post la milito multajn leterojn de personoj en senhejmulaj tendaroj eŭropaj, en kiuj oni petegis, ke mi trovu por ili garantiulojn je perlaboro por ke ili enmigru Kanadon. Preskaŭ neniu havis respondkuponon. La plimulto ne havis servokuponon. Kelkaj eĉ ne havis Esperanton. Mi komprenis, ke estas malfacile al ili posedi necesajn dokumentojn kaj mi volis helpi ĉiujn, sed ne kapablis. Unu tia peto aparte kortuŝis min. Iu latvo kun edzino, du filinoj kaj avino volis terkultivan laboron. Estis iom malfacile trovi garantianton por fraŭlo. Familio kaj avino eĉ pli komplikis la aferon! Ne kun espero mi priparolis ĝin inter miaj konatoj. Surprizis min trovi terkultiviston bezonantan helpon kaj ankaŭ posedantan neokupitan domon. Tiu eble estis la lasta el aro da islandaj enmigrintoj de antaŭ multaj jaroj. Kiam ili venis oni proponis al ili senpagan porcion da tero, sed tion ili trovis tro rokplena kaj tro neresponda al kultivado, kaj la plimulto el ili pluiris okcidenten al la grandaj stepoj. Nur ĉi tiu viro kaj edzino restis en la arbara vilaĝo, nomita—el la konata islanda monto—Hekkla. Li korvarmiĝis kaj konsentis doni garantion. Tuj mi komencis la oficialan korespondadon (la *ad* estas tre ĝusta!). Finfine venis permeso. Kiel pastro iom saĝa kaj Esperantisto iom entuziasma mi intencis profiti la okazon, religie kaj Esperante bon-

venigante tiun familion suferintan hejimperdon pro milito. Mense mi antaŭvidis solenan diservon en preĝejo ĉe kiu mi tradukos Esperanten la bonvenon de la vilaĝanoj kaj angla-lingven la respondojn de la fremduloj. Kaj kompreneble mi sendos propagandan raporton al la loka gazeto! Malfeliĉe prokrastiĝis la alveno kaj dume min kaptis mia emeritiĝo. Mi forlasis la distrikton kaj nur informiĝis letere ke ĉio okazis bele.

Tial ke Hekkla estas malproksima de urbo mi antaŭsciis ke la latvoj pli facile povus eniri ĝin, ol ili sukcesos eliri el ĝi, kiam finiĝos la deviga periodo de laboro terkultiva. Ili tamen restis ne unu jaron, laŭ sia promeso, sed du, antaŭ ol serĉi metian laboron, kiam okazis malbonŝanco. Ili suferis oftan kanadan sorton de loĝantoj en lignaj domoj: ĝi forbrulis! Feliĉe neniu perdiĝis.

Tre kontentigis min, ke ili jam restis la du jarojn anstataŭ—kiel ofte okazas ĉe enmigrintoj—forkuri neplenuminte la promeson pri unujara deviga servo. Aliaj iafoje atendas ĝis terkultiva krizo kiel ĉe semado aŭ rikolto, kaj subite postulas pli da salajro. Tia agado ne helpas aŭ la bieniston aŭ la enmigrantojn kaj malbonigas la aferon por tiuj kiuj ankoraŭ esperas enmigron. Plejparte tamen la fremduloj estas honestaj homoj kaj fariĝos indaj kanadaj civitanoj.

Helpu, ke ni provizu indan
gazeton

ESPERANTO

Diskonigu ĝin inter viaj amikoj
kaj korespondantoj

Internacia Konkurso 1952

Kiam oni pripensas la plialtigon de la kotizoj oni devas agnoski, ke la komenco por la nova jaro estas tre bona. Tio estas granda helpo al nia Asocio, kaj ebligas ke ni donu al niaj membroj indan gazeton kvante, kaj espereble ankaŭ kvalite. Se la enfluo de kotizoj restus same bona en la venontaj monatoj ni certe povus regule eldoni 32-paĝan gazeton, kaj ni ĉiam revas pri eĉ pli grandan. Dependas nur de la subteno de niaj kunlaborantoj ke tiu revo aktualigu! Vi faru vian eblon helpi al la progreso de via lando kaj tiel subtenu la plifortigon de nia komuna U.E.A.

Stato je 31 januaro, 1952

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Izraelo ..	350	355	101.4
2.	Japanujo ..	900	710	78.8
3.	Svislando ..	1400	1000	71.4
4.	Norvegujo ..	1700	1040	61.2
5.	Nederlando ..	4800	2800	58.3
6.	Finnlando ..	2600	1495	57.5
7.	Usono ..	2500	1359	54.3
8.	Germanujo ..	3200	1695	53.0
9.	Sud-Afriko ..	300	155	51.6
10.	Kanado ..	250	125	50.0
11.	Portugalujo ..	800	390	48.7
12.	Svedlando ..	5200	2515	48.3
13.	Maroko ..	500	240	48.0
14.	Urugvajo ..	250	115	46.0
15.	Belgujo ..	2300	1051	45.7
16.	Francujo ..	5500	2498	45.4
17.	Hispanujo ..	1300	580	44.6
18.	Britujo ..	12000	5249	43.7
19.	Italujo ..	2200	960	43.6
20.	Kubo ..	250	105	42.0
21.	Aŭstralio ..	850	265	31.2
22.	Irlando ..	250	65	26.0
23.	Aŭstrujo ..	1000	250	25.0
24.	Brazilo ..	4500	905	20.1
25.	Danlando ..	2700	450	16.7
26.	Nov-Zelando ..	800	120	15.0
27.	Islando ..	400	35	8.7

Erich Dahlmann :

Atentu ! Geinstruistoj ! Atentu !

JE Pentekosto 1952 okazos en Berlin la granda “Kongreso de la Geinstruistoj kaj Geedukistoj” de okcidentaj Germanujo kaj Berlin ; samtempe oni aranĝos gravan pedagogian ekspozicion. La temo de la kongreso estos *La principoj pri novformado de la germana klerigado*.

Jen bonega ŝanco atentigi la germanajn kaj atendotajn eksterlandajn pedagogojn kaj la kompetentulojn pri tio, ke Esperanto vere vivas kaj nepre devas esti instruata en la lernejoj.

Pro tio mia peto insista : Sendu salutlerojn (aŭ telegramojn) al la kongresa komitato, kies adreson vi trovos ĉi sube. Skribu en **Esperanto** kaj menciuj en germanlingva postskribaĵo :

“Herr Erich Dahlmann, Berlin-Frohnaŭ, Welfenalee 72, ist bereit, dieses Esperanto-schreiben zu übersetzen”. (S-ro E. D . . . estas preta traduki ĉi tiun Esperanto-skribaĵon.)

Pri Esperanto en la Berlin-aj lernejoj : laŭ la lerneja regulo de nia urbo ekzistas krom la *kerna instruo*, kiun ĉiuj klasanoj kune partoprenas, *kursa instruo* pri diversaj fakoj, el kiuj la gelernantoj devas elekti 4 (7-a klaso) aŭ 6 (8-a klaso) lecionojn semajne por kompletigi la *kernan instruon*. Al ĉi tiuj kursaj fakoj

apartenas ankaŭ Esperanto, al kiu oni disponigas du lecionojn en ĉiu semajno.

Ĉi tiun tre salutindan eblon la Berlin-a esperantistaro ĝis nun ne povis utiligi, ĉar en ĝia rondo la geinstruistoj estas bedaŭrinda malmultaj. Sed se vi plenumos mian peton salutskribante, vi atentigos ĉiujn gekongresanojn kaj ankaŭ la aranĝantajn instruist-sindikatojn kaj la germanajn kulturministroy, kiuj delegos reprezentantojn pri Esperanto. Sur tiel preparita tereno la Berlin-a kaj la germana esperantistaro povos progresigi nian aferon en ĉiuj pedagogiaj rondoj, gazetoj, unuiĝoj, oficejoj, k.t.p.

Do, karaj gekolegoj en ĉiuj landoj de la mondo, skribu grandnombre ! Ne okazu, ke eĉ unu lando mankas ! Notu la aferon ruĝinke en viaj kalendaroj ! Devigu la Berlin-an poŝton instalii specialan servon por majstri la inundon de viaj salutskribaĵoj !

Gratulu pro tio, ke laŭleĝe eblas instrui Esperanton en la Berlin-aj lernejoj !

Represigu ĉi tiun informon en viaj naciaj Esperanto-organoj ! Anticipe multajn dankojn !

*Erich Dahlmann,
U.E.A. delegito en Berlin.*

Adreso de la kongreso :

**Kongress der Lehrer und Erzieher,
c/o Berliner Verband der Lehrer und Erzieher,
Bernburger str. 24/25,
BERLIN S.W.11, Germanujo.**

Mason Stuttard :

La H-bombo

I A M A J legantoj de *Esperanto Internacia* eble memoras elstaran artikolon de T. L. C. Bluett en la numero de januaro 1946 pri la atoma bombo. Multaj korespondantoj sur la kontinento poste skribis, ke tiu estis la unua detala kaj fidinda informo pri la bombo kaj pri la efiko de la faligo sur Hiroŝima, kiun ili ricevis. Tiam temis pri faro farita. De tiam la sciencistoj de multaj landoj senĉese laboras pri “plibonigo” de tiu terura eltrovo, kaj la pensoj de la homoj nun direktiĝas kun kreskanta konsterno al la plej lasta produktaĵo de la fizikista laboratorio — la hidrogenbombo—kaj rigardas ĉiam pli fervore al la klopodoj por la starigo de ia fidinda bazo por la starigo de tutmonda paco.

Malmultaj detaloj kompreneble estas disponeblaj, sed de tempo al tempo diversaj informoj trafiltiriĝas al la publiko pere de paroloj kaj skriboj de eminentuloj tiel ke eblas formi ian bildon pri la nigra ombro superpendanta la tutan homaron.

Oni scias, ke hidrogenbomboj ekzistas. Oni scias, krome, ke kompare kun ili la atombombo de Hiroŝima—eĉ de Bikini—estas kiel musketo apud moderna aŭtomatpafilo. Ne post la nigra pesto de la dekkvara jarcento minace ŝvebas super la tuta mondo tiel potenca ekstermilo, kiel ĉi tiu bombo, povanta erupti energion *miloble pli grandan*, ol estis tiu de la bombo kiu falis en Japanujo !

La granda diferenco de principo en la konstruo de la du bomboj troviĝas ne ĉe la enhavo de la respektivaj bomboj, sed ĉe la konsisto de la ŝelo. Se la ŝelo de la H-bombo estus el

ŝtalo la sekvanta radiaktivo estus kompare malgranda. Se tamen en la materialo de la ŝelo troviĝus multe da—ni diru—kobalto, estus malfacile difini la limojn de la ampleksega detruo kiu sekvus rezulte de radiado. Kiam H-bombo eksplodas, liberiĝas grandegaj kvantoj da neŭtronoj, kiuj estas la plej penetraj eroj en la tuta konata materio. Fenomeno de tia eksplodo estas, ke tiel liberigita neŭtrono tuj penetras la nukleon de la plej proksima elemento kaj kaŭzas diversajn aliigojn en la naturo de tiu elemento. Iuj elementoj—la kobalto jam menciita—fariĝas treege radiaktivaj.

La fizikistoj do kapablas per difino de la konsisto de bomboŝelo determini la amplekson de la efiko, kiu povos, laŭ lastatempaj raportoj (William L. Laurence eminenta usona sciencraportisto) kaŭzi absolutan detruon sur tereno de 300 kvadrataj mejloj ; kiu povos kaŭzi incendiojn kaj severajn brulvundojn sur areo de 1.200 kvadrataj mejloj !

Ankoraŭ unu fenomeno de la radiaktivaj elementoj kreitaj de la eksplodo, estas la karakterizo daŭri longe aŭ mallonge. La efikeco de iuj radiadoj validas nur kelke da sekundoj ; sed ĉe aliaj la radiadoj restas mortigaj dum jaroj ! Per elekto de konforma materialo la kreantoj de la bombo povus sekvi, ke sur specifa tereno neniu homo, besto aŭ vegetaĵo povus vivi dum jaroj.

Kiam oni eksplodigis la A-bombon ĉe Bikini la radiaktivo estis registrata post malpli ol semajno en San Francisco. La ventoj estis portintaj

daŭrigo sur p. 79



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Box 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtĝirokonto : 153. 85.

Oficiala Komunikilo

Dua Bulteno : La Dua Bulteno estas en la presejo je la momento kiam ni faras la jenan raporton. Ĝi estos sendata al ĉiuj aliĝintoj tuj post ricevo el la presejo. Kun la bulteno estos Mendilo per kiu kongresanoj povos fari siajn rezervojn pri loĝejoj, ekskursoj k.s.

Kongresa Libro : L.K.K. decidis eldoni la Kongresan Libron jam en junio kaj tuj dissendi ĝin. Tiel la kongresanoj havos okazon studi ĝin antaŭ la alveno en la kongresurbo kaj povos ekkoni ĉiujn detalojn kaj sciindaĵojn pri la U.K. Pro tio L.K.K. ne eldonos trian bultenon.

Ekskursoj Dumkongresaj : Merkredon de la kongresa semajno okazos 3 ekskursoj : (1) al Kongsberg kun eblo viziti la arĝentminejon (kun 2 manĝoj), (2) al Sundvollen per

aŭtobuso kaj supreniro per kabloseĝo al rava elrigardejo (1 manĝo), kaj (3) ekskurso per ŝipo en Oslo-fjordo (1 manĝo), limigita je 350 partoprenantoj.


Antaŭkongresa Ekskurso : Kiu havas intereson ekskursi meze de julio al la nordo por vidi la nokto-mezan sunon, tuj sciigu al L.K.K. kiu faros aranĝon. Tia aranĝo estos streĉa kaj iom multekosta.

Statistiko : Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 8, Belgujo 17, Brazilo 1, Britujo 130, Danujo 31, Ebura Bordo 2, Finnlando 27, Francujo 81, Germanujo 43, Hispanujo 2, Indonezio 1, Irlando 1, Italujo 37, Izraelo 2, Jugoslavujo 5, Kanado 1, Kenjo 2, Nederlando 29, Norvegujo 140, Pollando 2, Portugalujo 1, Svedujo 104, Svislando 12, Usono 5. Sumo : 687 el 26 landoj. (31 jan. 1952)

daŭrigo (de p. 78)

la radiaktivan atmosferon 4.150 mejlojn ! Kompreneble la radiado ne estis malutila. Tiu disvastiĝo estis, kaj ankoraŭ estas, konsterna konstato pri la terura perspektivo kiun bildigas la H-bombo. La fortoj, kiuj decidis uzi la H-bombon—se oni ĝin uzos—

devos konsideri tiun aspekton. La bombo povos esti tiel pereiga por la atakantoj, kiel por la atakatoj, kaj la homoj povas nur esperi, ke tiu fakto — se ne aliaj, humanecaj, konsideroj—determinos la neuzon de ĉi tiu moderna *Frankenstein*.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*Recenzoj enhavas la proprajn opiniojn de la recenzintoj.
Ili ne necese estas laŭ la oficiala starpunkto de U.E.A.*

***Peer Gynt** de Henrik Ibsen, trad. E. Haugen, eld. Eldona Rondo. 19 × 13 cm., 258p. Prezo 15 ŝil. bind., 12ŝ. 6p. broŝ., afranko 6p.

Peer Gynt, norvega junulo, kiu ĉiam sin vidas kiel duondion, serĉas sian destinion laŭ la vortoj: Estu vi mem! En sia "si mem-eco", en sia memsufiĉeco, en sia memrealigo li opinias sin cezaro kaj tiel agas. Post multaj aventuroj li finfine maljunulo revenas al Norvegujo kaj renkontas la Morton, kiu lin serĉas por refandi. Li konstatas, ke "esti si mem" signifas, esti nenio. Tion li komprenis kiam li deŝiris tavolon post tavolo de la bulbo kaj trovis nenian kernon... nur tavolojn.

Bernard Shaw montris, ke la idealon de senkondiĉa sinefektivigo—la idealon "esti si mem"—Ibsen reduktis al absurdeco "... ĝuste kiel Cervantes prenis la malnovan idealon pri kavaliro kaj montris, kion rezultigas homo, kiu klopodas agi, kvazaŭ ĝi estus reala". Simile al Don Kihoto — ridinda sed ne malestiminda — ankaŭ Peer Gynt, kvankam li estas egoisma, ne estas malaminda.

Oni kutime pensas pri *Peer Gynt* kiel pri dramo, sed Ibsen nomis ĝin "drama poemo" kaj efektive estas pli bone konsideri ĝin kiel poemon; ĝi ne havas la precizecan strukturon de dramo, sed pli similas al sonĝo aŭ fantazio, en kiu unu afero povas sekvi alian, iafoje subite, iafoje mal-

konsekvence. Ĉu pro tio la poemo estas malbone konstruita? Ni povas respondi, ne, ĉar la imago forto de Ibsen ligas ĉiun parton, igas ĉiun scenon konduki al fino, kvazaŭ agordas ĉion per sama tonalo.

S-ro Haugen en sia bonega kaj tre helpa "Konciza Komentario" konvene esperas, ke "kelkaj el la abundaj pensoj de la verko ankaŭ fariĝos bataliloj en la mano de la esperantistoj por la ĉiutagaj skermetoj kontraŭ nacia memsufiĉeco".

Troviĝas kelkaj preseraroj sed ĝenerale ne gravaj. La rimarkigoj estas tre helpaj kaj la aldono de tri popolfabeloj helpas nin kompreni la fontojn de kelkaj partoj de la verko. La traduko estas flua, sen malfacilaĵoj, kaj brile sukcesa. Entute la verko estas havinda por ĉiu kiu amas la dramon, la poezion aŭ la pensigaĵon.

Papero kaj presado bonegaj.

W. J. Nesbitt.

***La Hundo Kruso** de R. M. Ballantyne; trad. J. M. Inman. Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd., Anglujo. 18×12cm. 150 p., prezo broŝ. 3 ŝil., afranko 3p.

Laŭ la titolo la libro rakontas la historion de hundo, sed efektive ĝi diras pli multe: pere de historio de hundo kaj de ĝia mastro, ĝi montras la vivon antaŭ jarcento en la Malproksima Okcidento, en "tiuj sovaĝaj herbecaj stepoj, kie la granda rivero Misuri fluas", kiel estas klarigite en

la unua ĉapitro. La romano estas tre interesa kaj en kelkaj ĉapitroj ĝi vigle streĉas la atenton de la leganto.

La lingvo ĝenerale estas bona, sed la tradukinto evidente ne decidis, ĉu por virseksa hundo estas pli bone uzi en Esperanto viran aŭ neŭtran gramatikan genron, sekve troviĝas alterne la pronomoj 'li' kaj 'ĝi', eĉ tute proksime; ekzemple je paĝo 39 oni legas la jenan strangaĵon: *Ĝis nun la dresado de Kruso tenis ĝin kuŝanta ĉe la loko, kie li devis resti...* Ankaŭ sonas tre strange legi 'ĝi' pri patrino, eĉ se temas pri hunda patrino.

La stilo estas ĉiam simpla, klara, plaĉa; pro tio la libro ne nur estas interesa aventurromano, sed povas esti taŭga legolibro por komencantoj kaj aparte konsilinda por geknaboj. Kvankam ne konante la anglalingvan originalon, mi neniel trovis ĉi tiun mallongigon tro resumita aŭ senproporcia. Ĝi estas libro, kiun oni volonte legas duan kaj trian fojon. Bona preso kun taŭgaj desegnaĵoj. Eldono alloge simpla kaj malmultekosta.

Niĉjo Minnaja. (15-jara.)

***ESPERANTO, 1951.** Eld. U.E.A. 20.5×14cm. 316 p., en tola bindaĵo. Por MA 1951 5ŝ. 6p., aŭfrankite, por aliaj 10ŝ. 6p. aŭfrankite.

"Ne bindigu viajn pasintjarajn kajerojn de ESPERANTO, sed aĉetu la pretan binditan jarkolekton, haveblan ĉe UEA," mi konsilus al ĉiu Membro-abonanto de nia asocio. Per tio vi havigos al vi je malalta prezo bele en verda tolo binditan volumon, kun ora titolo sur la dorso, kiu estas ornamo por via librobreto. Eble vi demandas: sed kion fari je du jarkolektoj? Pri tio ne embarasiĝu. Ĉu ne estas multaj samideanoj, kiuj ne povis aboni *Esperanton*, pro la

neeblo transsendi monon al la administrejo? Ĉu vi ne havas korespondanton en nepagipova lando, kiun vi povus plezurigi per la nebindita kolekto? Ĉu en nea okazo, vi ne povus pliriĉigi per ĝi vian grupan bibliotekon, aŭ la publikan bibliotekon de via urbo?

Eble estas inter la nunaj abonantoj, iuj, kiuj ne ricevis *Esperanton* en la pasinta jaro. Ankaŭ por ili la kolekto 1951 estas multvalora. Ili trovos en ĝi abundon da ĉiaspeca interesa legaĵo kaj gravan dokumentan materialon.

G.P. de B.

***Jarlibro de UEA 1952, 1-a Parto.** 15×11.5cm. 264 p. Ne aĉetebla, sed liverebla al individuaj membroj. Eld. U.E.A.

Ĉi tiu nova Jarlibro ampleksas denove 8 paĝojn pli ol la antaŭa (kvankam tri el ili estas blankaj, uzeblaj por notoj). Restas tamen progreso de 5 paĝoj, kaj ankaŭ la nombro da delegitoj (2018 en 60 landoj) pliiĝis. Krom la kutimaj oficialaj informoj ĝi enhavas i.a. listojn de landaj asocioj, de esperanto-gazetoj, de la lastaperinta literaturo kaj de Esperantistaj aranĝoj en 1952. Plie oni trovas en ĝi titolaron de la nuntempe haveblaj esperantaj verkoj kaj adresojn de la eldonejoj.

Pli ol dumil delegitoj en 60 landoj! Kiom da ebloj por praktika uzado kaj utiligo prezentas tiu adresaro! Ĉu oni sufiĉe uzas ĝin? E. Malmgren en sia Antaŭparolo opinias, ke ne, kaj li prave instigas grupestrojn kaj kursgvidantojn montri la jarlibron al ĉiu nova adepto kun rekomendo fariĝi individua membro de U.E.A. Mi rekomendas la samon al la nur-abonantoj de *Esperanto* por ke ankaŭ ili ricevu kaj povu uzi ĉi tiun jarlibron, ĉi tiun multvaloran ilon por praktikite utiligi Esperanton.

G.P. de B.

***Jarlibro de UEA 1951, 2-a parto.** 15×11.5cm. 48p. Cetere kiel ĉi supre. (Recenzo prokrastiĝis.)

Nedika libreto, sed kun enhavo, kiun ĉiu, kiu interesiĝas pri sia organizo, kun intereso legos. Raporto pri la membrostato, pri la agado 1950–51, pri la financoj, resumo de raportoj de Landaj Asocioj kaj ampleksa listo de Lernejoj en kiuj oni instruis Esperanton en 1950–51, kun multaj detaloj.

G.P. de B.

Esperanto Laerebog de K. Langgaard. Eld. Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere, Forlaget, Laksegade 35, København K., Danlando. 19×12.5cm., 116 p. Prezo Dan. kr. 4.50.

Ĉi tiu libro estas ĝisfunde kaj vere lerte verkita lernolibro; studinte ĝin oni bezonas nur pligrandigi sian vortprovizon por majstri la lingvon. Laŭ la antaŭvortoj ĝi estas kaj por kursoj kaj por memstudado, kaj tio eble kaŭzas, ke ĝi estas tro detala por uzado en kurso, ĉar ĝi ne lasas personan iniciaton al la instruisto, kaj samtempe iom “seka” por memstudado. Plej bone—ŝajnas al mi—ĝi taŭgas por memstudado de energiaj kaj iom kleraj homoj, kiuj aŭ akceptas la proponon de la verkinto pri la korektado de la skribaj taskoj aŭ trovas alian Esperantiston, kiu bonvolas helpi tiurilate.

La verkinto klopodas laŭ la moderna skolo ruze enmeti la gramatikon. Ĉu ne preferinde tuj antaŭ la ekzemploj doni la gramatikajn regulojn anstataŭ pli malpli poste skribi “*vi verŝajne jam rimarkis ke . . .*” aŭ ion similan (paĝo 16 pri “as”, p. 28 pri “o” kaj “a”, p. 21 traduko danen kaj p. 26 traduku danen, la regulon oni trovas nur sur

p. 33, k.t.p.). Sur p. 41 estas parto de la regulo pri la nedifinita aŭ nepersona subjekto “det” kaj “der”, sed nur sur p. 69 oni trovas la lastan parton.

Preserarojn mi trovis sur la paĝoj 12, 17, 21, 53 (‘Traduku danen.’ La teksto jam estas danlingva), 89 (Ved *udsagnsordenes** 1. grad, devas esti *tillaegsordenes***) kaj 91.

* verboj

** adjektivoj

Tiuj eraroj tamen estas malgravaĵoj kaj la libro estas rekomendinda.

H.B.J.

Ricevitaj :

(petante, skribu nur Esperante)

La Hungara Provinco : 28-paĝa bele ilustrita grandformata broŝuro eldonita de IBUSZ, Hungara Informa Kontoro por Fremdultrafiko, Lenin-körut 67, BUDAPEST VII, Hungarujo. Ĝi estas eĉ pli bela ol la antaŭa broŝuro **Hungario** eldonita de la sama instanco.

Internacia Bonhumoro : du n-roj de bone multobligita gazeto en Esperanto. Redakcio: Strindbergsvej 36, Kopenhago Valby, Danlando. Jarabono (4 n-roj) 5 Dan. kr. aŭ 10 int. rpk.

Itala Turisma Klubo : nova Esperantlingva faldfolio enhavanta informon pri tio, kion I.T.K. disponigas al interesuloj en la kampoj de turista literaturo kaj kartografio pri Italujo. Petu de : Touring Club Italiano, Corso Itala 10, MILANO, Italujo, kiu provizas ekzempleron al ĉiu el siaj membroj por 1952.

Naskiĝo de la Universalista Kredo : *Richard E. Lambert.* Prezo 2 int. rpk. ĉe Esperanto Book Service of America, 114 W. 16 Street, New York, N.Y., Usono. Historio pri religia sekto.

daŭrigo (de p. 70)

Tuj antaŭ la kongreso ili ricevos, se eble, informojn kaj programon de la kunvenoj kaj ejoj por Esperantistoj. Ili prefere vojaĝu kun la landaj grupoj de aliaj pilgrimantoj.

Erik Rydman : (*Redaktoro de Köpmanen—La Komercisto*)

Pri la komerco en Svedujo

(Antaŭ kelkaj monatoj *Esperanto* enhavis artikolon pri la konsumkoopero en Svedlando verkita de eminenta propagandisto de tiu movado. Por ke la legantoj ne havu unuflankan, nerealan bildon de la komercado en la norda lando, eble estus interese vidi la aferon ankaŭ per la okuloj de la konkurantoj de la konsumkoopero, la sennombra privata detalkomercistaro de Svedujo.—Red.)

LA rolon de la vardistribuado en la socia ekonomio dum la lastaj jardekoj kaj tute speciale dum la jaroj post la milito, oni komencis observi en tute alia maniero ol pli frue. Ankaŭ la konsumantoj de pasintaj tempoj certe bedaŭris prezaltiĝojn—sed ili lasis ĝenerale la aferon resti ĉe la bedaŭro, ĉe la registrado de la fakto kvazaŭ io neevitebla. Prezaltiĝoj jam longe apartenis al la ĉiutaga ordo en la plej multaj landoj eŭropaj, kaj oni povas nun rimarki alispecan intereson pri la problemo de distribuado: unuflanke komprenon pri tio, ke la distribua kosto mem havas decidigan signifon por la prezo, kiun la konsumanto devas pagi; aliflanke pligrandigitan observemon al la demando, kio estas farebla por malaltigi tiujn kostojn.

En Svedlando tiu intereso estas tre granda, kaj la demando pri “la raciigo de la komerco” apartenas al la pli ĝenerale diskutataj problemoj. La kaŭzoj estas pluraj: unu el ili estas trovebla en la strukturo de la lando. Svedujo estas laŭ sia surfaco unu el la plej grandaj landoj de Eŭropo, laŭ sia nombro de loĝantoj unu el la pli malgrandaj. Precipe la mezaj kaj nordaj partoj karakteriziĝas per tio, ke industria kaj aliaj lokoj situas je grandaj distancoj unuj de la aliaj, disigitaj de vastegaj arbar-regionoj kaj treege maldense loĝataj dezertoj. Estas evidente, ke la kostoj de vardistribuado en tiaj cirkonstancoj nepre estas relative altaj.

Tamen la *entuta* distribuadkosto (t.e. jam de la transporto de la varo ĝis la distribuo trans la vendotablon) estas ĉ. 50% de la prezo de la konsumanto, kio estas konsiderinde malpli ol ekz-e en Usono. La parto de la podetala komerco troviĝas proks. ĉe la duono (la resto apartenas al la distribuado plenumata de la industrio kaj de la pogranda komerco), kio ankaŭ ne estas alta, precipe se oni pensas pri tio, ke la servado de la detalkomerco ankaŭ en malproksimaj landpartoj estas alte evoluinta kaj la ekipnivele de la butikoj estas tre alta.

Unu klarigo estas supozebla trovebla en tio, ke la konkurenco en la sveda detalkomerco estas forta. Estas do ĉefe la privataj kaj la konsumkooperaj entreprenoj, kiuj konkurencas inter si, unuavice en la kampo de la nutraĵliverado.

Oni havas ofte en fremdaj landoj la koncepton, ke la koopero superregas la ekonomian vivon de Svedlando kaj precipe la svedan komercon. Nenio povus esti pli erara. La koopero certe montras al granda nombro da “membroj”, sed tio tamen ne estas mezurilo de la potencrilatoj. La ĝusta mezurilo kompreneble estas ciferoj pri la vendado. El la tuta debito de la podetala komerco la privata komerco havas ĉ. 80%, la koopera ĉ. 12% kaj la ceteraj entreprenformoj (poŝtmenda komerco k.t.p.) ĉ. 8%. Por la nutraĵ-komerco sola la ciferoj estas iom aliaj: tie la privata komerco havas proks.

75% kaj la koopera inter 20 kaj 25 procenton. Ceteraj formoj de komerco ĉi tie ne havas menciindan signifon.

La strebado al raciigo en la sveda detalkomerco ankaŭ aperas en la intereso, kiun oni montras al la "memservado". Ekzistas nuntempe inter 200 kaj 300 tiaj butikoj, tiel privataj kiel kooperaj, kaj la nombro tre rapide kreskas. Oni povas trovi vendejojn kun memservado ne nur en la grandaj urboj, sed ankaŭ en malproksimaj, izolitaj vilaĝoj provincaj.

La plimulto de detalvendejoj en Svedlando—tute kiel en aliaj landoj—estas malgrandaj unuoj. La mez-nombro de dungitoj estas po 3 por ĉiu butiko. Ekzistas preskaŭ 80.000 detalvendejoj kaj la nombro de komizoj estas ĉ. 220.000. El la tuta nacia enspezo—proks. 25 miliardoj da sv. kronoj ĉiujare—ĉirkaŭ la duono trairas la manojn de la detal-komerco.

La plej multaj privataj podetalistoj aliĝis al sia centra organizaĵo *Sveriges Köpmannaförbund*, la Sveda Komercesta Federacio, ampleksanta la 17 plej gravajn fakojn kaj kun 37.000 membroj. La federacio havas tre multflankan agadon, zorgas pri la interesoj de la komerco antaŭ la ŝtataj aŭtoritatoj kaj en la komuna vivo same kiel antaŭ la publiko opinio. Ĝi havas lernejon en Stokholmo, kiu certagrade estas centra instruejo por la detalkomerco

de la lando kaj ĉiujare instruas ĉ. 12.000 komercistojn kaj komizojn. Troviĝas speciala arkitekta oficejo laboranta por la plialtigo de butika konstrukulturo, impostoteknika konsilejo kaj pluraj aliaj institucioj.

Flanke de tiu ĉi organizaĵo kaj libere staranta apud ĝi ekzistas ankaŭ ekonomia organiza movado en la nutraĵa komerco *Inköpscentralernas Aktiebolag* (Akcia Societo de la Aĉeto-Centrejoj). Ĝi estas formita de kvar grandaj aĉetentreprenoj kun la detalkomercistoj kiel ĉefaj akciuloj kaj kun la celo sekurigi al la privata komercistoj—kajkuntiokompreneble ankaŭ finfine al la konsumantoj—la avantaĝojn de grandaĉetoj. ICA eldonas semajnan revuon por la dommastrinoj, kiu ne nur pledas por aĉetoj en la ICA-vendejoj, sed ankaŭ donas valorajn konsilojn, receptojn, informojn kaj amuzan legaĵon.

Estas klare, ke la konkurenco inter la diversspecaj formoj de entreprenoj en Svedujo donis al la konsumantoj la veran garantion, ke ili havu siajn varojn je la plej favoraj prezoj por la plej bonaj kvalitoj kaj liverataj kun la plej evoluinta servopreto. En tiu konkurado la privata komercistaro sveda, plenevidente kaj bonsukcese, ludas gravegan, por ne diri ĉefan rolon.

(Verkita specife por *Esperanto* kaj tradukita de Karl Gustafsson, D. de U.E.A. en Bergvik.)

nun pretaj

recenzo sur p. 81

volumoj de

ESPERANTO, 1951

verdtolte binditaj—kun indekso
316 paĝoj kun multaj ilustraĵoj

por MA 1951 de U.E.A. : 5ŝ. 6p. afrankite
por aliaj : 10ŝ. 6p. afrankite

Mendu ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) Anglujo

F-ino J. Baird :

Pri la Skota lingvo

KIU ajn deziras konatiĝi kun la vera stato de Skotlando dum pasintaj tempoj, kaj, kun precizeco nericevebla el historiaj rakontoj, sciigi detale pri la ĉiutagaj okazaĵoj de nia vivmaniero socia, civila kaj nacia, tiu devas zorge studi la enlandanajn kronikojn de nia lando. Ŝanĝo ja okazadas dum longa tempo. La sentoj kaj kutimoj ekzistantaj je la tempo de la Unuiĝo de la reĝlandoj, kiuj jam impresis sur la skotan karakteron tiom da pentrindaj karakterizaĵoj, ne povis postvivi la pligrandiĝantan interkomunikiĝon inter Angllando kaj la mondo.

Kompreneble ĉi tiu ŝanĝo grandparte okazis antaŭ tempo rememorebla de la nuna generacio. Granda ŝanĝo jam okazis dum nia tempo, kaj ankoraŭ restas nur la kompare malpli grandaj nuancoj de diferenco, kaj baldaŭ restos malmulto rimarkinda.

Nu, temon, kiel estas ĉi tiu, oni povas ilustru nur per sufiĉa aplikado de anekdotoj, kiuj nepre elmontros la karakterizajn trajtojn de la estinteco.


La rememorigaĵoj, precipe tiuj pri la idiomo de la skota lingvo, ilustras, kompreneble, ŝanĝojn ĉe dialekto kaj esprimoj. Oni supozas, ke en antaŭaj epokoj la popoloj de la du landoj—Angllando kaj Skotlando—parolis preskaŭ malsamajn lingvojn kaj oni povas ankaŭ supozi, ke de la periodo de la Unuiĝo de la reĝlandoj, la lingvoj pli kaj pli alsimiliĝadis. Oni efektive povas eĉ nun rimarki la alsimiliĝadon okazantan, kaj post nelonge inter kleruloj ekzistos malmulte da diferenco rimarkebla.

Vera Skoto ne povas ne havi fortajn inklinojn—nomu ilin, se vi

volas, naciaj partieceoj. Li enkorigas grandan amon al la skota lingvo. Multaj niaj pure skotaj romanoj, pro beleco kaj kortuŝemeco, estas nesuperitaj en iu alia lingvo. Kiel esprimplenaj, kiel belsonaj, estas ĝiaj frazoj! Ili estas netradukeblaj. Ekzemple—oni renkontas malnovan amikon, ili parolas pri estintaj tagoj kaj memorigas al si multajn amikojn karajn al ambaŭ, iam ĝojajn, junajn kaj gajajn—de kiuj, iuj ankoraŭ vivas honorataj, prosperaj kaj feliĉaj—sed aliaj sub nubo de malfeliĉo kaj malhonoro—ankoraŭ aliaj malsaniĝintaj aliaj jam enterigitaj. Oni rememorigas al si bonkonatajn lokojn—malnovajn kunulojn, plezurojn kaj celojn; kiel Skotoj niaj koroj estas tuŝataj de ĉi tiuj rememorigaĵoj de *Auld Lang Syne* (Estintaj tagoj). Neeble estas trovi similan frazon en la angla lingvo. Oni ne povas ĝin traduki. Ĝiaj taŭgeco kaj beleco kuŝas en la trafeco de la idiomo mem. Kiel multaj similaj belaj esprimoj, ĝi estas netradukebla en alian lingvon.

Sed efektive estas ĉe la diroj de maljunaj sinjorinoj, ke devas esti serĉata la plimulto da citindaj pikemaj skotaj esprimoj tiaj, kiajn oni ne plu aŭdas.

Sinjorino Baird de Newbyth, patrino de nia distinginda samlandano David Baird, estis bonega ekzemplo de tiuklasa sinjorino. En la jaro 1780 okazis kuraĝa sed malfeliĉa batalo kontraŭ Hyder Ali, en kiu partoprenis ŝia filo, tiam Kapitano Baird. Kiam alvenis el Hindujo la novaĵo pri ĉi tiu afero, oni diris, ke li kaj aliaj oficiroj estis kaptitaj kaj duope kunkatenitaj. Kiel eble plej milde amikoj transdonis al la patrino la malĝojigan sciigon.



La ponto trans la rivero Forth en Skotlando. La tuta longeco estas proksimume 2½ km : alteco proks. 120m.

Kiam tamen ili ja igis ŝin tute konstati la situacion de sia filo kaj de la bravaj kunuloj, preterlasante por la momento siajn proprajn sentojn de malĝojo, kaj memorante nur la ĉiaman viklecon kaj gimnastikemon de sia filo, ŝi povis pensi nur pri lia kompatinda kunulo, kaj ĉio dirita de ŝi estis: “Dio kompatu la junulon, al kiu estas katenita nia Daĉjo !”

Pastro en la sudorienta parto de Skotlando provizis bonegan anekdoton pri maljuna sinjorino, kiu venigis sian kuraciston por konsiliĝi kun li pri ulcerita gorgo, kiu de kelkaj tagoj doloris al ŝi. Ŝia kuracisto, viro kun liphararo kaj barbo laŭ la tiama modo, estis enkondukata en ŝian ĉambron. La maljunulino, post la interŝanĝo de la kutimaj salutoj, priskribis sian malsanon al la inda filo de Eskulapio. “Nu,” diris li, “ĉu vi scias, Sinjorino McFarlane, ke mi antaŭe ofte suferis pro tiu samspeca malsano ĉe la gorgo; sed de tiam, kiam mi lasis kreski mian liphararon kaj la barbon, neniam plu mi suferis pro ĝi.” “Sed, sed . . .” diris la maljunulino seke, “tio povas esti, sed vi devos priskribi por mi ian alian recepton por forigi la malsanon mian,

ĉar vi sendube scias, ke mi ne povas sekvi vian ekzemplon.”

Ĉe la esprimoj de Skotoj de antaŭaj jarcentoj estas pikeco kaj originaleco tute malsimilaj je tio trovata nun.

Estas dirite de iuj aŭtoritatuloj, ke ekzistas ĉe la Skotoj nenia spriteco. Nu ĉie troviĝas malsprituloj kaj seriozuloj, kiuj mem povas nek ŝerci, nek ĝui ŝercon; sed vere tio ne estas natura karakterizaĵo de Skotoj. Mi kuraĝas diri, ke ja ekzistas forta rilato inter la skota temperamento, ĉu nomata ŝercemeco aŭ vera spriteco, kaj ja ekzistas skolo de skota humoro amuza, kaj ekster ĉio, krome, karakteriza, kvankam tiu ŝercemeco ne ĉiam devenas de la spriteco aŭ lerteco de la partoprenantoj. La amuzado devenas de la cirkonstancoj de la kunokazo aŭ la kuniĝo de ideoj, kaj en multaj okazoj de la lingvaĵo uzata por esprimi la faktojn.

La spriteco de la rakonto estas nedubebla, tamen neniu penis esti sprita. Alivorte, estas la skota idiomato, kiu provizas la pikecon. Al la samaj ideoj, alie esprimitaj, tute mankus la pikeco.

La jenaj anekdotoj bone ilustras la sinmontrandon de nacia sento en nacia

spriteco pri gravaj okazintaĵoj de la Skotlanda historio.

Rakontite estas, ke en Inverary antaŭ multaj jaroj estis subaŭdita interparolo inter kelkaj bovvendistoj pri la kuraĝo de la skota marmilitistaro. Unu esprimis surprizon, ke Nelson eldonis sian signalon ĉe Trafalgar, laŭ la vortoj “Anglujo esperas . . . k.t.p.” Al li iu faris respondon, kiu ŝajne tute kontentigis la ceterajn. “Jes, Nelson diris ‘esperas’ nur pro la Angloj. Nenion li diris pri Skotlando, ĉar li **sciis**, ke la Skotoj ja faros sian devon.”

Al tio mi aldonu la jenan animtrankvilan skotan rimarkon faritan pri Bannockburn.*

Apatia Anglo diris al skota kamparano, ke neniu kun gusto iam proponus restadi en tia lando, kia estas Skotlando. “Gustoj estas malsamaj,” respondis la ruza Skoto. “Mi povas alkonduki vin al loko ne


* Sanga batalo inter armeoj de Robert Bruce (la Skotoj) kaj Edward II (la Angloj) en 1314.

malproksima de Stirling, kie 30,000 viaj samlandanoj jam pli ol 500 jarojn restadas, kaj ankoraŭ ne proponas ĝin forlasi.”

Pripensantaj pri tiuj malnovaj rakontoj, oni ŝajne travivas alian epokon kaj per tiuj rememorigaĵoj interparoli kun generacio malsama de la nuna.

Ŝanĝoj ankoraŭ okazas ĉirkaŭ ni. De longa tempo ili okazadas. Klarigi tiun fakton, estis la celo de ĉi tiu verko. Instigis min al la tasko profunda intereso pri ĉio skota. Oni eble nomas la taskon vana. Kial konservi memoron pri naciaj strangaĵoj? Skotlando jam unuiĝis kun nacio pli potenca. La tago eble venos, kiam ĉiuj strangaĵoj ĉe dialekto, kutimoj kaj moroj malaperos. Esperate estas, ke neniam venos la tago, en kiu Skotoj forgesos la altan kaj veran karakteron de sia nacio.

(Elĉerpaĵoj tradukitaj de F-ino Jane Baird el *Reminiscences of Scottish Life and Character* de Dekano Ramsay—1857).



El la Oficejo

Adresoj. Kiam vi skribas al la oficejo, ni tre petas ke vi bonvolu meti vian plenan adreson sur ĉiun leteron. Adreso sur koverto ne helpas, ĉar ni ne konservas la kovertojn. Se vi translokiĝas kaj ŝanĝas vian adreson, bonvolu informi nin, ĉar se ni ne scias la novan adreson ni ne povas sendi la gazeton al ĝi.

Ne malofte ni ricevas plendon pri nericevo de gazeto kaj poste evidentiĝas, ke oni ne sciigis al ni pri nova adreso!

Jarlibro. Oni bonvolu noti laŭ la informo sur paĝo 67, ke la Ĉeĥoslovakaj gazetoj *Esperantista* kaj *Esperantisto Slovaka* ne plu aperas: sekve la informoj sur paĝoj 76–77 de la Jarlibro ne estas ĝustaj, kaj ni ne plu povas akcepti abonojn por tiuj gazetoj.

Belartaj Konkursoj 1951 : Poezio Traduka

Andrew Young

3-a premio

La Mamoj de Ĝura*

*Pli frue, transmarkole,
Ĉi mamojn vidis mi
Leviĝi ronde, mole,
Ne du sed tri ;*

*Nun rokojn mi tenegas,
Kiuĵ dissplite akras :
Lagopoj grizaj gregas,
Kaj musko magras ;*

*Nebulo-haroj pendas
Al mi kaj nudo mama,
Dum grimpe mi ascendas
Furioze ama.*

* Montoj sur insulo Gura.

trad. William Auld

Robert Louis Stevenson 1-a premio

James Shirley

2-a premio

En la Montoj

Morto la Egaligulo

*En kamparo inter montpejzaĝoj,
Kie ruĝas maljunulvizaĝoj,
Kaj knabinokuloj
Plenserenas ;
Kie la esenca prasilento
Benas, kaj en ĉiu monto-fendo
La muzik' pli bela
Ŝvebas, svenas.*

*La gloroj de la rang' kaj raso
Fantomas nur, kaj ne realas ;
Ne estas kontraŭ Sort' kiraso ;
Sur reĝojn mort' fridmana falas.
Sceptro kaj kron'
En velkodron'*

*Grimpi, kie mia koro estas,
Kie en pramontoj ruĝaj nestas
Birdoj, kaj la kampoj
Verde helas,
Kaj post vespermorto milkolora,
Kiam venas nokto astreglora,
Jen en valkavaĵo
Lampoj stelas.*

*Falos, egalos en argilo
Al simplaj serpo kaj fosilo.
Por kelkaj estas glavrikolto,
Akiras ili laŭran kronon :
Sed iam cedos la nervforto—
Subigas homo nur la homon.
Nepre al Sort'
Cedos la Fort' :*

*Sonĝi kaj vekigi, piediri
Tie, kaj en trankvilec' enspiri
En la trancsilento—
Rava sorto ;
Tie inter herb' kaj floroj densaj
Pasas nur la fortoj pli potencaj,
Nur riveroj, ventoj,
Vivo, morto.*

*Ili la finan spiron spiros,
Kaptitoj, kaj al mort' rampiros.
Velkas girland' sur frunteburo,
Do ne plu pavu pri l' merito :
Jen sangas sur altarpurpuro
De l' morto, la venkint-venkito.
Venos la pomp'
Al frida tomb' :
Nur justulfaroj dolĉodoras,
Nur ili en la polvo floras.*

trad. Pastro J. Dinwoodie

trad. Pastro J. Dinwoodie

Ŝtepan Urban :

Novelo

Nokta ekspreso

KRAKETANTE monotone tranĉis la Orienta Ekspreso la densan nokton. Observado al la fajraj strekoj rapide pasantaj preter la fenestro jam lacigis min kaj preninte gazeton mi provis denove legi. Sed la malgranda plafonlampo ne lumis sufiĉe klare kaj mi baldaŭ rezignis la legadon. Kia enuo, la nokta vojaĝo . . . kia enuo. Kial mi ne preferis uzi la matenan vagonaron?

Mia sola kunvojaĝanto, kaŝita en sia mantelo, dormis senĉese en angulo de la kupeo. Se mi almenaŭ dum momento povus vidi, kiel li aspektas, mi iomete provus diveni lian karakteron por diveni liajn interesojn. Kia senfina enuo . . . ! Kaj mi laŭte kunpremis la gazeton.

La pasaĝero vekigis kaj oscedante rigardis horloĝon. Post momento li elpoŝigis anglan pipon, plenigis ĝin kaj ĝin bruligis. Li kvazaŭ ne rimarkis min. La odoraj nubetoj ŝvebis en nia kupeo kaj la tempo malrapide pasis. Mi trovis cigaredon en mia poŝo sed mia bruligilo spitis obstine kaj daŭre kaj la atendata flamo ne montriĝis, malgraŭ ripetitaj provoj.

Tiam mia kunvojaĝanto la unuan fojon rigardis min, iomete riproĉe, kaj proponis al mi siajn alumetojn. La cigaredo ekbrulis.

“Mi preferas pipon,” diris mia kunulo kun fremda akcento, ridetante enigme. “Antaŭ la milito mi fumis cigaredojn, sed mi ne plu alkutimiĝus . . . Mia kompatinda herbario . . . ; Nun mi fumas nur anglan pipon,” kaj li eksilentis.

“Kion vi diris ? Ĉu herbario . . . ?”

“Ĉu mi diris ion pri herboj ? Pardonu, mi ne scias . . . ” li respondis hezite, kvazaŭ mirigita ; sed mi tuj rimarkis bone kaŝatan inciton en lia voĉo.

“Jes, vi diris ‘Mia kompatinda herbario . . . ’ ”

“Nu, ne gravas . . . ”

Sed mia intereso jam estis vekita kaj mi volis scii, kial li estis incitita. Kelkajn momentojn li ankoraŭ silente meditis pri io. Subite li komencis rakonti.

“Mi ĉiam intencis fariĝi natur-esploristo. Kiel infano mi evitis la societon, kaj la ordinarajn ludilojn kaj ludojn kun aliaj infanoj mi ne ŝatis. Kun plej granda ĝojo kaj intereso mi foliumis en libroj pri naturscienco, kolektis skarabojn, florojn kaj ĉion eblan. Precipe mia kolekto de arbfolioj estis enviinda. Nia familio vagadis tra la plej diversaj ŝtatoj kaj lokoj kaj mi ĉien trenis mian ŝatatan kolekton, ne ĉesante ĝin pliriĉigi je ĉiu okazo. Post jaroj, kiam mi devis disiĝi de la familio, mi ankoraŭ interesiĝis, kaj diletante daŭrigis mian kolektadon. Mi trovis la plej diversajn rilatojn en ĉiuj mondpartoj kaj miaj konatoj, konante mian strangan pasion, sendadis al mi de tempo al tempo ion interesan por mia kolekto. Unu sendis specojn de tabakfolioj el Suda Ameriko, dua venenajn folietojn el Hindujo, alia florojn el Afriko. Mi sekigis ilin kaj dum libera tempo ordigis kaj metis ilin kun latina surskribo en mian kolekton. Mia herbario senĉese pligrandiĝis. Venis la mondmilito. Ĉiuj rilatoj estis interrompitaj kaj mi

soligis kun mia kolekto, en fremda lando. Mi intencis sub' kaŝnomo sekrete travivi la militon, sed montriĝis, ke mi devas agi pli singarde. Mi plurfoje devis ŝangi la loĝejon. Ĉu vi estas fumanto jam de longe?" li demandis.

Mi respondis jese kaj streĉite instigis lin daŭrigi.

"Do vi certe scias, kiel fartas pasia fumanto, kiam li vidas, ke lia provizo da tabako komencas malaperi. Ankaŭ la mia rapide malgrandiĝis kaj mi pripensis rezigni je fumado. Mal-longan tempon ankoraŭ estis ricevebla piptabako kaj mi unu tagon aĉetis la pipon."

"Kial vi ne ricevis tabakkupon-ojn?" mi demandis.

"Nu, mi ne estis aliĝinta ĉe la polico kaj kiel fremdulo devis nepre eviti ĉiun eblecon renkonti la policianojn."

"Jes, tion mi komprenas!"

"Koncizadire, mi devis unu tagon ataki mian herbarion. Tie troviĝis multaj specoj de tabako kaj mi sciis prepari ilin por la fumado. Mi prenis unu tabakfolion post alia. De tempo al tempo mi aldonis eĉ aliajn folietojn kaj sukcesis krei tre interesajn kaj apartajn odorojn kaj ĝuis ilin kun volupto. La afero de tiuj miksaĵoj fariĝis tre interesa kaj ankaŭ iom danĝera, ĉar kelkaj plantoj enhavis venenon kaj mi ne ĉiam sciis, ĉu mi post la fumado nepre ne devos viziti kuraciston! Unu vesperon okazis io terura. Post kelkaj enspiroj de fumo tuŝis min stranga sento. Nedifinebla incito enigis mian menson kaj ekregis min. Mi tuj estingis la pipon kaj formetis ĝin. Sed ve...! Jam tro malfrue. Mi sentis min meze de senfina oceano de fajro, baraktanta kiel ŝipeto sen gvidilo sur la tempesta

maro. Fajraj flamoj atakis min de ĉiuj flankoj, kaj tute ne havante la povon eĉ de plej malgranda movo, mi falegadis en senfundan fajran abismon. Senfine malsupren... kaj subite mi ekstaris vid-al-vide antaŭ la Granda Nekonato... kaj mi malaperis por ĉiam..."

Mia kunvojaĝanto eksilentis kaj bruligis sian estingiĝintan pipon. La fajro dum momento lumigis lian vizaĝon kaj mi povis observi la profundajn malgajajn sulkojn ĉe lia buŝo. Interesa vizaĝo. Peza nigra mallumo regis ekstere.

"Kial vi diras, 'por ĉiam'?" mi demandis, sed nur por interrompi la silenton. "Ĉu vi ne sidas ĉi tie en la vagonaro?"

"Jes por ĉiam. Mi ne sentas plu la pasantan tempon, kaj mi ne trovas diferencon inter pasinta tempo kaj la estonteco."

"Ĉu vi scias ion pri... ", mi povis demandi.

"Jes, mi scias ĉion... sed tion vi ne komprenus", li aldonis malgaje.

"Kial do...?"

"Mi iafoje sukcesas, nur dum mallonga tempo, reveni al normala vivo, sed mi tuj devas reen. Ankaŭ hodiaŭ pasos baldaŭ."

Mi rigardis la horloĝon. Ankoraŭ duonhoro mankis ĝis la plej proksima stacio. Ĉu la fremdulo, eble frenezulo, restos ĝis tiam kvieta?

"Ĉu vi scias pri la estonteco...?"

"Ne estu scivolema, amiko," li respondis malgaje.

"Tamen..."

"Nu, se vi deziras..." li hezitis iomete kaj subite elpoŝigis gazeton kaj transdonis ĝin al mi, preskaŭ ordonante, ke mi legu:

GRANDA FERVOJA KATASTROFO !

Sesdek personoj, pasaĝeroj de la Orienta Ekspreso ekveturinta laŭ veturplano, mortintaj ! Difektitaj reloj . . . La vagonaro elreliĝis dum plena rapido . . .

TERURA SPEKTAKLO !

. . . savhelpantoj, malhelpataj de tempesto, laboris la tutan nokton . . .

Nur nun mi rimarkis, ke ekstere la vetero ŝanĝiĝis, kaj ke regas fulmotondro. La fulmoj kruciĝis sur la nigra firmamento kaj ĉiumomente prilumadis la gazeton. Mi subite rimarkis la daton. Sensencaĵo ! La dato estis la morgaŭa ! La morgaŭa gazeto aperos nur post kvar horoj . . . Tion mi bone scias. Kaj jen . . . Mia propra nomo inter . . . Ĉu estas eble ? Mi ja estis tie menciita . . . kiel mortinta ! Mia rigardo saltis al la fremdulo, kaj mi komencis perdi la prudenton. Malvarma ŝvito aperis sur mia dorso . . .

“Ĉu vi timas ?” demandis la fremdulo malgaje. “Ne timu ! Mi scias ĉion . . . mi gvidos vin . . . Mi ne dubas . . . vi mem ne plu revenos ! KREDU !”

“Sed mi volas vivi !”

“Ne timu, amiko !”

“Mi ja ne volas morti !”

“Trankviliĝu, amiko . . . Jen, la pipo . . . prenu ĝin. enspiru almenaŭ unufoje . . .”

Mi eksaltis kaj per la tuta forto ektiris la savbremson kaj preskaŭ senkonscia ĵetis min en la koridoron La radoj ekhurlis . . .

* * *

Post minuto de silento komencis zumi homaj voĉoj kaj la pasaĝeroj kiel formikoj svarmis apud la haltinta vagonaro.

“Kiu tiris la bremson ĝuste antaŭ la ferponto ?” iu demandis. Mi volis klarigi sed mia gorgo kuntiriĝis kaj mi simple . . . ne povis. Subite forta krio eksonis de antaŭ la lokomotivo.

“La reloj estas difektitaj !”

Ĉiuj kuris antaŭen. Mi senforte rampis reen en la vagonaron, apogante min sur ĉio atingebla kaj ŝanceliĝante sur la malfortiĝintaj malbone servantaj piedoj. Mi intencis danki al mia kunvojaĝanto kaj savanto.

* * *

Mi trovis neniun. Mallaŭte mi vokis en la koridoron. Neniu resonis. La mistera fremdulo malaperis.

Post horo, kiam reboniĝis la reloj, ni daŭrigis la vojaĝon. En la plej proksima stacio mi ricevis novan kunulon, maljunaŭ viron kun ridetanta vizaĝo kaj gajaj okuloj. Serĉante la plej konvenan kaj oportunan pozicion, li palptrovis sur la sidloko kuŝantan objekton.

“Ĉu estas via pipo, sinjoro ?” li demandis.

Miaj pensoj ankoraŭ estis distritaj kaj mi senpripense respondis, “Jes, kompreneble. Dankon, mi forgesis ĝin.” Mi prenis la pipon kaj enpoŝigis ĝin. Eble mi iam renkontos la misteran fremdulon. Li povos demandi pri sia angla pipo . . .





Por via distro

Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon

La vidpunkto.

Rimarkas ostro al ostrino: "Amatino! Viaj konkoj similas al oreloj; viaj perloj aspektas kiel dentoj!"

La familio kiel ŝtato.

Sinjoro A al sinjoro B: "Mi envias vin — vi havas modelan familian vivon!"

Sinjoro B: "Tute simple: mia familio similas bonorganizitan ŝtaton — la financministro estas mia edzino; militministro mia bopatrino; ministro por eksteraj rilatoj mia filino kaj la avino estas ministro por edukado."

Sinjoro A: "Kaj vi, vi certe estas la Prezidanto?"

Sinjoro B: "Ne—Prezidanto estas la kuiristino."

Sinjoro A: "Kaj kiun vi reprezentas?"

Sinjoro B: "Ho—mi estas la popolo, kiu pagas la impostojn!"

Leona kuraĝo.

Estis la kulmino de la leondresado, kiam la leono singarde forprenis peceton da sukero de la lipoj de la eksterordinare bela dresistino. "Ankaŭ mi kapablas tion!" krias rigardanto.

"Kio nu? Vi riskus lasi forpreni de viaj lipoj peceton da sukero fare de ĉi tiu besto?"

"Ho ne—sed de viaj lipoj mi forprenus ĝin same kiel la leono."

Kio estas via V.-K.?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Nov-Zelando.

Divenu la ĝustajn en la signifoj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio. (Respondoj sur p. 96)

1. **Kartavi** : (a) tralavi la gorgon, (b) prononci la literon r per la gorgo, (c) flategi?
2. **Preludo** : (a) lekcio, (b) adjektivo esprimanta kvaliton, (c) antaŭludo al muzika verko?
3. **Hidroplano** : (a) aeroplano kiu leviĝas de sur la akvo, (b) flugkampo, (c) metalo?
4. **Libelo** : (a) longa maldika insekto, (b) kritika artikolo, (c) tropika vegetaĵo?
5. **Spili** : (a) malŝpari, (b) tute plenigi, (c) fari en barelo truon por eltiri fluaĵon?
6. **Spektro** : (a) fantomo, (b) rimarkinda vidaĵo, (c) malgranda spegulo?
7. **Enketo** : (a) paperujo, (b) metoda esploro pri opinio, (c) besto?
8. **Debato** : (a) diskuto laŭ ordigita maniero, (b) herbaĵo, (c) sumoj ŝulditaj al iu?
9. **Emulsio** : (a) kortuŝo, (b) malsano, (c) lakteca fluaĵo?
10. **Bramo** : (a) iu arbeto, (b) riverfiŝo, (c) frukto?



ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (franclingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 402m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG. Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.30–17.50	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 233m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel lunde. P. D-ro Privat.
Vendredo	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur la unuan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde, sed ĉiusemajne. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 236.

4-an de Februaro 1952

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Januaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj	1945	1087
Individuaj membroj		
MJ	376	362
MA	2405	2132
MS	183	313
Patronoj ..	14	7
DM	208	256
HM	58	57
	— 3244 —	3127
	5189	4214

JARLIBRO. En la unua semajno de Februaro la jarlibro eliris al tiamaj pagintoj. Se iu el tiuj ne ricevis ĝin, li informu la Centran Oficejon.

DELEGITOJ

Aŭstralio

Melbourne. FD (Junul-aferoj) : F. Halls, 59 Nepean Highway, Elsternwick, S.4, Vic. Tel : LF 8045.

Belujo

Liège. D : vakas.

Britujo

Glasgow. FD (Inĝenieraj aferoj) : vakas.

London. FD (Ornitologio) : J. Farrand, 58 Westbere Road, N.W.2. Tel : HAM-pstead 8174.

FD (Skoltismo) : vakas.

Danujo

Aarhus. D : vakas.

FD (Fervojoj) : J. Christoffersen, Hallsti 43.

Finnlando

Helsinki. FD (Instruado) : vakas.

Pieksämäki. D : O. Suhonen, Kaakinmäenkatu 16.

Francujo

Noeux-les-Mines. D : vakas.

Germanujo

Bad Kohlgrub. D : S-ino L. Bulle, Haus Edelweiss, Bad Kohlgrub, Obb.

Bedburg (22c). D : E. Pankalla, Neustr., Bedburg, Bez. Köln.

Hungarujo

Felsögöd. D kaj FD (Fervojoj) : vakas.

Jugoslavujo

Pula. FD (Teatro) : vakas.

Nederlando

Deventer. D : C. B. Zondervan, Sweelinck-str. 2. Tel : (K6700) 4253.

Vianen. D : J. Litz, Hoeufftlaan 6.

Norvegujo

Oslo. FD (Religio) : vakas.

Røros. D : Hans Amund Rosbach.

Nova Kaledonio

Pagoumène. D : A. Lagoutte, magasin S.C.I.E.

Portugalujo

Lisboa. FD (Radio) : M. Martins de Araujo, Rua 4 de Infantaria 98-4.

Svedujo

Kramfors. D : Sven Möllestad, Box 5. Tel : 425.

Skövde. FD (Natur-scienco) : vakas.

Tibro. D : I. Svensson, Gästgivarevägen 7.

Vingåker. D : Tore Hallerström, Billsbro. Tel : 24.

Usono

Pharr (Texas). D : Armin Doneis, Box 105.

Portland (Oregon). D kaj FD (Bahaismo) : S-ino A. Kincaid, 7034 N. Charleston Ave., Portland 3.

PATRONOJ 1952

7. Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Anglujo

8. Toms, S-ro C. H., Freshwater, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

210. de Jong, S-ro H., Umtata, Sud-Afriko

211. Alemán Ruiz, D-ro A., Habana, Kubo

212. Rayner, S-ro R. W., Ruiru, Kenjo

213. Arton, S-ro A., Vollsjö, Svedujo

214. Karlsson, S-ro E., Vilshult, Svedujo

215. Karlsson, F-ino H., Klippan, Svedujo

216. Mellberg, F-ino G., Varberg, Svedujo

217. Bevan, S-ro F. O., Farnborough, Anglujo

218. Larking, S-ro S. H., London, Anglujo

219. Miskimmon, S-ro W. A., Hamilton, Skotlando

220. Wright, S-ro R. E. S., Sutton, Anglujo

221. Bellatti, S-ro S., Catsfield, Anglujo

222. Skogstrøm, S-ro G., Drammen, Norvegujo
 223. Skogstrøm, S-ino L., Drammen, Norvegujo
 224. Mazzantini, D-ro R., Savona, Italujo
 225. Dresselhaus-Brockmann, S-ro H., Schloss Holte, Germanujo
 226. Lutz, S-ro H., Porz, Germanujo
 227. Lamprecht, D-ro H., Essen, Germanujo
 228. Knecht, S-ro F. P., Casablanca, Maroko
 229. Almèn, S-ro P., Hällefors, Svedujo
 230. Lindberg, S-ro T., Prässebo, Svedujo
 231. Stenström, S-ro J., Ulricehamn, Svedujo
 232. Shanks, S-ro J., Hamilton, Bermudo
 233. Dusausoy, S-ro J., Paris, Francujo
 234. Lagarde, S-ro L., Paris, Francujo
 235. Taylor, S-ro F. V., Albury, Aŭstralio
 236. Jensson, S-ro A., Oslo, Norvegujo
 237. Cather, S-ro W. A., Torquay, Anglujo
 238. Crofts, S-ro F. W., Guildford, Anglujo
 239. Edwards, S-ro G. D., London, Anglujo
 240. Ford, S-ro J., Southport, Anglujo
 241. Goulding, S-ro C., Longton, Anglujo
 242. Groen, F-ino M. C., Ilford, Anglujo
 243. Harris, S-ro F., Bath, Anglujo
 244. Leather, S-ro A. J., Blackburn, Anglujo
 245. Russell, S-ino G. E., Dartmouth, Anglujo
 246. Seddon, S-ino R., Southport, Anglujo
 247. Smith, S-ro N. R., London, Anglujo
 248. Strapps, F-ino P., Ilford, Anglujo
 249. Turton, S-ro G., Huddersfield, Anglujo
 250. Atkinson, S-ro W. G., Ipswich, Anglujo
 251. Cunningham, S-ro W., West Wemyss, Skotlando
 252. Latimer, S-ro R. F., Bentley, W. Aŭstralio
 253. Ramsay, S-ro C., East Devonport, Tasmanio
 254. Hölzenspies, D-ro W., Baarn, Nederlando
 255. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, Nederlando
 256. Muller, S-ro J. L., Bussum, Nederlando
 257. Tiessen, S-ro T., Den Burg, Nederlando
 258. Weeke, S-ro F., Den Haag, Nederlando
 259. Bergsagel, S-ro O., Stavanger, Norvegujo
 260. Ericson, S-ro D. B., Palisades, N.Y., Usono
 261. Knox, S-ro W. A., Cloverdale, Mich., Usono
 262. Mitschke, S-ro F., Paterson, N.J., Usono
 263. Simon, S-ro W., Memphis, Tenn., Usono
 264. Sumner, S-ro F. H., Bay City, Ore., Usono
 265. Vedder, S-ro F. W., Miami, Fla., Usono
 266. Martins da Cruz, S-ro A., Benguela, Angolo
 267. Prud'hon, S-ro G., Fontenay, Francujo
 268. Brugiotti, S-ro A., Paris, Francujo
 269. Dedieu, F-ino J., Toulouse, Francujo
 270. Gaillard, S-ro A., Paris, Francujo
 271. Lynch, S-ro J., Dundee, Skotlando
 272. Sgroi, S-ro R., Catania, Italujo
 273. Nakayasu, S-ino K., Nisinomiya, Japanujo
 274. Ericson, S-ro A., Sköldinge, Svedujo
 275. Antunes, S-ro J., Lisboa, Portugalujo
 276. Rego, S-ro M. L. do., Lisboa, Portugalujo
 277. Bishop, S-ro W. O., London, Anglujo
 278. Blacklock, S-ino L. E., Parkstone, Anglujo
 279. Hammond, S-ro R. E., Coventry, Anglujo
 280. Cavalcanti, S-ro A. B., Vitoria, Brazilo
 281. Coutinho, S-ro A. C., Rio de Janeiro, Brazilo
 282. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo
 283. Falcao, S-ro F., Belém, Brazilo
 284. Gonçalves, S-ro W. F., São Paulo, Brazilo
 285. Padua, S-ro G., Rio de Janeiro, Brazilo
 286. Passos, S-ro S. F., Fortaleza, Brazilo
 287. Santos, F-ino Z., Teofilo Otoni, Brazilo
 288. Campbell, S-ro A. R., Belfast, Irlando
 289. Kushlick, S-ro I., Johannesburg, Sud-Afriko
 290. Sharpe, S-ro L., Burlington, N.C., Usono
 291. Malmgren, S-ro E., Stockholm, Svedujo
 292. Häkansson, S-ro G., Traryd, Svedujo
 293. Bloemendal, F-ino S. W., Lochem, Nederlando
 294. Hoekma, S-ro A., Den Haag, Nederlando
 295. Appleby, S-ino C. I., Nottingham, Anglujo
 296. Ashworth, S-ro H., Liverpool, Anglujo
 297. Baker, S-ro C. A., Exeter, Anglujo
 298. Boatman, S-ro D. P., Westcliff, Anglujo
 299. Denton, S-ino M. T. D., London, Anglujo
 300. Edwards, F-ino A. B., Stockton-on-Tees, Anglujo
 301. Goodfellow, S-ino V., Whitburn, Anglujo
 302. Hattersley, S-ro C. M., Mexborough, Anglujo
 303. Ison, F-ino H. M., Ardleigh, Anglujo

304. Jones, S-ro D. R. T., Lampeter, Kimrujo
 305. Mallett, F-ino E. E., Edgware, Anglujo
 306. Millidge, S-ro R. G., Sutton, Anglujo
 307. Rapley, S-ro J. C., London, Anglujo
 308. Squire, F-ino E., W. Hartlepool, Anglujo
 309. Tozer, S-ro W. G., London, Anglujo
 310. de Vere, S-ino H., Wrotham, Anglujo
 311. Worcester, S-ino D. M., London, Anglujo
 312. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Kimrujo

DONACIOJ. J. Futran 21ŝ., A. Lovati 20ŝ.,
 A. Lomo 23ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Kio estas via V.-K.?

Respondoj (*vidu p. 92*)

1. (b) **Kartavi** estas prononci la literon r per la gorgo.
2. (c) **Preludo** estas antaŭludo al muzika verko.
3. (a) **Hidroplano** estas aeroplano kiu leviĝas de sur la akvo.
4. (a) **Libelo** estas longa maldika insekto.
5. (c) **Spili** estas fari en barelo truon por eltiri fluaĵon.
6. (a) **Spektro** estas fantomo.
7. (b) **Enketo** estas metoda esploro pri opinio.
8. (a) **Debato** estas diskuto laŭ ordigita maniero.
9. (c) **Emulsio** estas lakteca fluaĵo.
10. (b) **Bramo** estas riverfiŝo.

Esperantista Vivo

Geedziĝo

Martin-Suarez. F-ino Paquita Martin kaj S-ro Jorge A. Suarez en Rosario, Argentino, je 14 februaro 1952.

Naskiĝo

Spiré. Al Ges-roj Alejandro Spiré, en Buenos Aires, Argentino, je la 27-a de januaro, filo Andrés Ignacio.

Ni esprimas nian sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Andonoviĉ, Dragomir, pioniro de nia movado en Serbio, mortis en 1951.

Atanasov Uzunov, Steian, delegito bulgara en la kongreso de Genève, 1906, mortis en 1951.

Baxter, John M., FD de UEA en Glasgow, Skotlando, subite mortis je la 27-a januaro 1952, 63-jara. Tre bone konata ankaŭ internacie, li estis aparte bona aktivulo en Skotlando.

Buchenel, René, je 3 februaro 1952, 37-jara, finigis sian vivon sekve de nerva krizo. Dum pluraj jaroj li estis oficisto de UEA en Genève.

Denk, D-ro Viktor, samideano en Vinkovci, Jugoslavujo, en oktobro 1951.

Hunter, George B., en Edinburgo, Skotlando, je 5 februaro 1952. Vigle laboris Esperante dum pli ol 30 jaroj.

Kasoviĉ, Ernest, Ĉefdelegito de UEA en Jugoslavujo kaj komitatano de JEF, mortis post mallonga malsano je 8 decembro 1951, 53-jara. Li esperantiĝis en 1938, okupis gravajn postenojn en la sialanda movado, kaj estiĝis ĈD de UEA en 1946. En tiu posteno li modele laboris, malgraŭ multaj malfacilaĵoj pro la specialaj cirkonstancoj en sia lando.

Kirhofer, Stefo, samideano en Slavonski Brod, Jugoslavujo, 27 oktobro 1951, 52-jara.

Kyftenbelt, R.W.F., en Utrecht, Nederlando, 11-an de jan. 1952, 86-jara. Li faris multon por Esperanto en Indonezio kaj Nederlando; li predikis en la Esp. diservo en la U.K. en Hago 1920.

Magotteaux, Lucien, delegito de UEA en Liège, Belgujo, en januaro 1952, 70-jara.

Persson, Oscar, FD-fotografo amatora en Göteborg, Svedujo, la 31-an de jan. 1952.

Petritsch, Ernest Felix, en Vieno, 18 decembro 1951, 73-jara. Li speciale sin okupis pri lingvonormigo.

Vargas, D-ro Ambrosio, kuracisto en Mexico-urbo, pioniro de Esperanto ekde 1903 en Meksiko, mortis 1951, 84-jaraĝa.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Ĉar la tero pleniĝos de konado de la gloro de la Eternulo, kiel la akvo plenigas la maron. *Habakuk 2.14.*

Pri bredado de abeloj : A. P. Andersen (Nederlando). Prezo 5ŝ. 6p. Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe vialanda libroservo.

Esperanto-Asocio de New York kunvenas ĉiumonate. Ĉiuj bonvenaj. Telefonu : BU-4 0963. Dormont.

Kalocsay — *Lingvo, Stilo, Formo* ; Kalocsay-Waringhien — *Plena Gramatiko* (prefere dua eld.). Kiu volas revendi tiujn eldonaĵojn faru detalan proponon al : Esperanto, Oostenstr. 26, ANTWERPEN, Belgujo.

80 gelernantoj (14–60 jaraj). deziras korespondadi kun ĉiuj landoj. Adreso : Frant. Pytloun, Zamenhofova 1010, HRADEC KRÁLOVÉ II, Ĉeĥoslovakujo.

Helpu la Esp. movadon en Hispanujo. Por propagandekspozicio ne bezonas ĉiajn Esperantaĵojn : librojn, broŝurojn, salutkartojn, afiŝojn, k.t.p. Ni respondos al ĉiuj. Adreso : Esp. Propagandekspozicio, Str. Forn 19, MOYA (Barcelona), Hispanujo.

Mi estas dek-kvin jara kaj deziras korespondi kun (juna) samidean(in)o pri diversaj temoj. Afable skribu al S-ro Gunnar Hallman, Prästgårdsgatan 20 A, KÖPING, Svedujo. Respondo garantiata.

14 gekursanoj deziras korespondi per leteroj aŭ poŝtkartoj. Respondo certa. Skribu multnombre al Rainer Dahl, Box 97, VILSHULT, Svedujo.

Pentristo deziras interŝanĝi pentraĵkartojn, skizojn, kaj korespondi kun la tuta mondo. Nepre respondos. Adreso : Natale Bertoletti, Alz. Nav. Grande 66, MILANO, Italujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, LOONOPZAND (N. Br.), Nederlando.

Kiu serioze interesiĝas pri “flugantaj subtasoj” (spacoŝipoj el alia planedo ?) tiu bonvolu skribi al E. Biddle, 1513 High Road, LONDON, N.20, Anglujo.

Bildkartvesperon aranĝos Esperanto-grupo de Oxford je la 7-a de Majo. Bonvole sendu salutojn. Certe respondos. Sekr-ino E. Chaundy, 21 Grays Road, OXFORD, Anglujo.

Deziras interŝanĝi leterojn S-ro Rudolf Calek, Ricklefsweg 5, WILHELMSHAVEN, Germanujo.

Deziras korespondi kun samideanoj kaj samideaninoj el la tuta mondo, Ted Dorotik, NACMINE, Alta., Kanado.

Aŭgusto 2–9, 1952. Skota Federacio Esperantista : Se vi ne povos ĉeesti la U.K.-on ĉe Oslo ni invitas vin partopreni intiman 34-anan esperantosemajnon en la bela gastodomo “Woodlands”, apud la urbo Galashiels, situanta meze de la alloga Skota limregiono. Studado, diskutoj, lernado, distro. Kosto £5 (krom ekskursoj). Mendu jam nun al F-ino Stevenson, 45 Northumberland Street, EDINBURGH 3, Skotlando. Aliĝpago 10 britaj ŝilingoj.

J. Juan Forné, Taquigrafo Marti 3, VALENCIA, Hispanujo, deziras korespondi per bildkartoj aŭ leteroj kun gesamideanoj el Anglujo kaj Usono.

Prestwich Esperantista Societo aranĝos letervesperon Aprilon 7an. Oni nepre respondos al ĉiu sendanto. Sek : Agnes Dean, Nia Hejmo, 67 Butterstile Lane, Prestwich, Nr. MANCHESTER, Anglujo.

10 gelernantoj deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun la tuta mondo. Skribu al : Benny Nielsen, Vejlevej 49, KOLDING, Danlando.

Por baldaŭa propagandekspozicio ni bezonas afiŝojn, broŝurojn, librojn, gazetojn multajn fotografaĵojn, filatele afrankitajn kovertojn kaj kartojn, turismajn faldfoliojn. Per viaj dokumentoj propagandfilmo estos farata. Respondos al ĉiuj. Sendu al : Ribot, rue Vergnes, MARMANDE, Francujo.

La Esperanto-Klubo Tel-Aviv, Israellando, 4 Johanan Hasandler str., aranĝas letervesperon fine de Majo 1952. Sendu tuj grandamase leterojn, il. poŝtkartojn, prospektojn, k.t.p.

La 31.III.1952 aranĝas E. K. Litvinov letervesperon : ĉiu ricevos respondon kaj fotografaĵojn. 20 niaj geklubanoj volas korespondi k.ĉ.l. (10–35 jaraj). Skribu multnombre al J. Pastor, Rooseveltova 646, LITVINOV I, Ĉeĥoslovakujo.

Tridek gekursanoj, 13–25 jaraj, deziras korespondi kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, k.t.p. Certe respondos. Esperanto-Grupo “Marsmonto”, Hauptstr. 33, (21b) NIEDERMARSBERG, Germanujo.



Jus aperis

en esperanta traduko de E. A. Haugen
la ĉefverko de la norvega literaturo :

Ibsen : PEER GYNT

Prezoj : bind. 15 ŝil., afranko 6p.
 broŝ. 12 ŝil. 6p., afranko 6p.

**Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo**

Ĉu vi iros al Oslo ?

Se jes, komencu vian vojaĝon unu semajnon pli frue kaj partoprenu la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør, Danlando, 25/7-1/8, sub auspicio de UEA. Speciala karavano, malmultekosta, de Helsingør al Oslo kaj reen estos aranĝata. Petu prospekton pri la kursaranĝoj ĉe

**S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando**

PREMIAJ ROMANETOJ

Verkitaj de konkursintoj
23 mallongaj noveletoj diverstemaj.
96 paĝoj, broŝ.

Prezo 1 ŝil., afranko 2p.

**Mendu ĉe U.E.A.
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo**

KRONIKO JAPANA

el Ĉin- kaj Japanlingva originalo tradukis Kyūiti Nohara

(Vidu la recenzon sur paĝo 50—Feb.)

Kvin volumoj papere binditaj, presitaj sur tre bona papero
Entute 818 paĝoj 22×15 cm.

“Vere grava aldono al nia literaturo”

Prezo 25 ŝil. - - Afranko 1ŝ. 6p.

Eldonita de Japana Esperanto-Instituto

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

